MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

6
1982
13,– Ft

Eldonejo *Műszaki* ofertas al la estimataj legantoj kaj fakuloj la subajn librojn en la hungara lingvo, necesajn por studado, ampleksigo de la konoj, kaj por la ĉiutaga laboro:

Barnabás Bárczy: Diferencialaj kalkuloj
28,- Ft

Barnabás Bárczy: Integralaj kalkuloj
36,- Ft

I.N. Bronstein — K.A. Semendjaev: Matematika poŝlibro
90,- Ft

d-ro László Zsombory: Lernolibro de la Trafika Kodo (KRESZ)
30,- Ft

Ervin Keller — Alajos Kalivoda — László Menczer: Ekzercoj por la ellerno de trafikreguloj
48,- Ft

Ervin Kovács: La tornisto (Industria Faklibraro) 45,- Ft

László Kovács: Poŝlibro de teknikistoj
89,- Ft

Vilmos Milley — István Völgyes: Centra hejtado I-II. (Industria Faklibraro) 62,- Ft

Gyula Obádovics J.: Matematiko
80,- Ft

Károly Opitzer (ĉefred.): Muntado de duktoj akva, kanalizacia kaj gasa I-II. (Industria Faklibraro) 94,- Ft

György Rábel: Poŝlibro de maŝinfakaj teknologiistoj
91,- Ft

Zoltán Ternai: Lernolibro pri aŭtomobila tekniko

La Eldonejo *Műszaki konvene al la pretendoj de la legantoj daŭre reeldonas la suprajn librojn.*

Ili konstante estas aĉeteblaj:

en Budapeŝto en la vendejoj de Ŝtata Librokomerca Entrepreno, en provinco en la vendejoj de la Librokomerca Entrepreno Klera Popolo kaj en tiuj de Kooperativa Librokomerca Entrepreno.

Mendojn oni sendu al:

Eldonejo *Műszaki*
Budapest I. 1014
Szentháromság tér 1.

ELDONEJO MŰSZAKI

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIIa jaro, 1982 n-ro 6
(106)

ENHAVO

Fenyvesi, E.: Ĉevaloj, husaroj kaj aliaj 202
Szabó, I.: Por havi komunan konscion 204
El hungara popola poezio (*Kalocsay*, K., *Szabó*, I.) 207
Rados, P.A.: Tri geaktoroj pri siaj planoj 208
Originala poezio 210
Mihalkov, G.: Tra la famaj kafejoj de Budapeŝto 211
Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 6. 212
László, I.: Zoltán Kodály, la reformisto de la muzika edukado 214
László, I.: La reĝo de l' opereto 216
Hernádi, Gy.: RNA (*Benczik*, V.) 218
Örkény, I.: Opinio-sondado (*Szabó*, I.) 219
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 220
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 223
László, F.: Agrikultura progreso pere de akvomastrumo (*E.F.*) 224
Libroj el Budapeŝto 230
Benczik, V.: Intervjuo kun Lorjak 231
Paĝo de komencantoj 232
Thorsen, P.: Limerikoj 232
Kníchal, O.: Hobio 233
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 235
Recenzoj 236
Hárs, L.: Poemo pri la poeto (*Varga*, J.) 237
Enigmoj 239
Leterkesto, Korespondi deziras 240

Sur la titolpaĝo foto de *Z. Fejér*

Ĉevaloj, muziko, kafejoj...

jen nur kelkaj el la riĉa temo-gamo de tiu ĉi numero, kompletiganta la 22-an jarkolekton de Hungara Vivo. Ĉevaloj kaj hungaroj estas tre parencaj konceptoj por multaj eŭropanoj, ŝajnas do utile artikole prezenti, kiun lokon ĉevaloj okupas en la konceptaro de hungaroj.

Alia artikolo – sub titolo *Por havi komunan konscion* – pritraktas la hungaran folkloron; tiun ĉi artikolon kompletigas hungara popola balado kaj kelkaj popolkantoj. Nia bulgara kunlaboranto Georgi *Mihalkov* rakontas pri la historio de la Budapeŝtaj kafejoj, kiu fakte kunfandiĝis kun la historio de la hungara literaturo kaj kulturo ĝenerale.

La hungara muzika kulturo estas tutmonde konata, sed eble eĉ pli grandan famon akiris la hungara muzikpedagogio. István *László* prezentas la pedagogian agadon de la granda hungara komponisto Zoltán *Kodály*, kies centenarion ĉijare oni festis tutmonde. Cetere, en la jaro 1882 naskiĝis ankaŭ alia hungara komponisto: Imre *Kálmán*, la «reĝo de l' opereto», aŭtoro de sennombraj mondkonataj operetoj – ni omaĝas per artikolo ankaŭ al lia memoro.

Ŝatantoj de la moderna hungara literaturo verŝajne plezure legos la novelojn *RNS* de Gyula *Hernádi* kaj *Opinio-sondado* de István *Örkény:* ili ambaŭ havas tre karakterizan, specialan aromon.

Ankaŭ la originala Esperanta literaturo havas decan lokon en tiu ĉi numero: oni povas legi poemojn de *Thorsen, Francis, De'Giorgi, Guglielminetti* ktp. kaj skizon de O. *Kníchal.* Intervjuo kun *Lorjak* estas unikaĵo, ja la publiko tre malmulte scias pri tiu ĉi populara prozisto, kies novelaro *Iluzioj* ĵus aperis en Budapeŝto. Pri la Budapeŝta libroproduktо raportas aparta artikolo, kies aŭtoro ne povis plendi pri manko de raportindaĵoj.

Kiel en la pasinta numero ni raportis jam, fine de marto 1983 denove okazos en Budapeŝto tre riĉa teatra programaro. En tiu ĉi numero aperas intervjuo kun tri hungaraj geaktoroj, kiuj preparas solistajn programojn por tiu ĉi dua Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. La turisman aspekton de la aranĝo prizorgas la Turisma Komisiono de HEA, interesiĝantoj do turnu sin al ĝi (Pk. 193, H–1368 Budapest). Laŭ niaj informoj en pluraj landoj – interalie en Ĉeĥoslovakio kaj Pollando – ŝtataj entreprenoj turismaj akceptas aliĝojn al tiu ĉi unika evento de la Esperanta kulturo.

Ĉevaloj, husaroj kaj aliaj...

Kuregantaj ĉevaloj sur la stepoj, riĉe pasamentitaj uniformoj de husaroj, „Kincsem" – la mirakla ĉevalino de la pasinta jarcento: bildoj, kiuj ĉe multaj vekas ideon pri „rajdanta nacio", pri lando de belaj ĉevaloj.

La epiteto *rajdanta nacio* certe pravas – se paroli pri pasintaj tempoj; sed nuntempe jam sole la eminenta ĉevalbredado kaj la multaj rajdlernejoj pravigas ĝin. Ankaŭ en Hungarlando malmultiĝis ĉevaloj dum la lastaj jardekoj, kvankam belaj ĉevaloj ankoraŭ multloke estas videblaj – kaj rajdeblaj.

La hungararo, kiu antaŭ pli ol mil jaroj konkeris la landon, vere rajdante venis de la orientaj stepoj sur seloj de malgrandaj, viglaj kaj rapidaj ĉevaloj. Tiuj alkutimiĝis al kruda vetero, brave obeis en batalo, ebligis al la rajdanto sagojn pafi eĉ dum galopo. La bataltrupoj rajdis dum tago ofte 50-80 km-jn (la batalantoj havis po 2-3 ĉevalojn por ŝanĝi), kaj tio ebligis surprize abruptajn atakojn de malproksime.

La malpeza kavalerio ankaŭ en postaj tempoj konsistigis la plej fortan parton de la hungara armeo, kaj tio aparte validas pri la longa interbatalo kontraŭ la turka armeo. Dum la konfrontado ambaŭ flankoj volonte profitis de alies ĉevaloj, ili ankaŭ vendis kaj aĉetis, interŝanĝis, eĉ donacis eminentajn ĉevalojn. Bonegaj arabaj bredistoj prezentis tiamaniere siajn favorajn efikojn al la Hungarlandaj ĉevalaroj. Tiuj abunde troviĝis dum la postaj jarcentoj en grandbienoj de princoj kaj aristokratoj. La brava kaj orname vestita hungara kavalerio, la *husaroj* vekis altan intereson kaj respekton tra la tuta kontinento. Multaj landoj transprenis tiun specon de rapide moviĝantaj batalionoj, kun la batalmaniero kaj ekipaĵo ankaŭ la veston kaj la nomon. Kiel konate, ankoraŭ komence de nia jarcento en multaj armeoj fieradis la koloraj batalionoj de husaroj...

La modernan, anglatipan ĉevalbredadon kaj konkursadon enkondukis komence de la pasinta jarcento István *Széchenyi* (seĉenji), kiun niaj legantoj jam konas, i.a. pro la gvidrolo en la reguligo de la Danuba „Fera pordego". Dank' al liaj instigaj verkoj (faklibro „Pri ĉevaloj" k.c.) kaj verva propagando, krom li ankaŭ aliaj bienuloj importis „pursangajn" el Anglio. Li kreis tiucelajn societojn kaj komencis la ĉevalkonkursojn por stimuli la bredadon kaj trejnadon. La rezultoj iĝis indaj al la tradicioj. Komenciĝis brila periodo de la hungara ĉevalbredado, kion montris konkursaj triumfoj tra Eŭropo kaj – egaj ciferoj de la sportĉeval-eksporto. Sufiĉas, se ni mencias la neniam venkitan rapidegan *Kincsem* (Trezoro mia), kiu eĉ nun, post 100 jaroj, estas famega en la mondo de la kurejoj, kaj kies idoj iĝis ankaŭ elstaraj galopantoj.

La dua mondmilito pereigis preskaŭ la duonon de la Hungarlandaj ĉevaloj. Pereis multe da unuarangaj sportĉeva-

loj kaj necesaj heredigantoj (-inoj), liveritaj al la nazia armeo. Per egaj malfacilaĵoj oni sukcesis kolekti kaj reakiri onon de la plej valoraj, tre delikataj bestoj. Detruiĝis konkursejoj kaj staloj, pereis multaj bonegaj fakuloj, oni devis denove komenci...

Tiutempe la agrikulturo ankoraŭ bezonis la ĉevalan forton, kiun la multaj etaj farmoj ne povis neglekti. La reproduktado sukcesis: en 1960 oni kalkulis denove 750 mil ĉevalojn en la lando, do la antaŭmilitan nombron oni jam sukcesis atingi. Tiam estis la kulmino, ĉar dume plivastiĝis la kooperativoj de la kampuloj, kaj rapide moderniĝis la ŝtataj grandbienoj. Sekve de la akcela mekanizado la nombro de la ĉevaloj malkreskis de jaro al jaro. La abunda maŝinaro de la agrikulturo decide flankenŝovis la paciencajn kvarpiedulojn desur la kampoj, poste ankaŭ el la staloj. Jam apenaŭ uzataj, plejofte nur por internaj transportoj ili tiras ankoraŭ ĉarojn kun furaĝoj aŭ similaj – por etaj distancoj tre energion ŝpara maniero. Multajn ĉevalojn utiligas ankaŭ la vilaĝaj transportistoj.

Nuntempe en Hungarlando vivas ĉ. 110 mil ĉevaloj, kio ŝajnas stabila nombro, ĉar la granda malkresko jam antaŭ pluraj jaroj haltis. La mondo ja multe ŝanĝiĝis depost *Kincsem:* la motoroj anstataŭas la fidelajn amikojn de la homo en la mastrumado kaj trafiko, nek la armeoj paradas en selo, rajdante, eĉ la hungaraj husaroj apartenas jam al la eksa mondo. Kio restis, estas nur la *sepono* de la iama Hungarlanda ĉevalamaso, tamen respektinda kvanto por selekti sportcele kaj taŭge bredi la plej altkvalitajn. Ĝuste el tiu vidpunkto oni rajtas paroli pri renesanco de la ĉevalsporto.

Certajn rasojn – pursange – oni bredas en kelkaj ŝtataj ĉevalaroj, en aliaj – ankaŭ en kooperativaj – vivas mikssangaj ĉevaloj. Entute *kvindeko* de ĉevalaroj estas uzataj por racie kontinuigi la laŭcelan bredadon, helpe de eminentaj fakuloj kaj foje kun veraj ĉeval-amatoroj. Inter la zorge selektitaj rasoj estas laŭdevene arabaj-anglaj (Furioso, Kisbér k.a.), ankaŭ aliaj altvaloraj rasoj (Lipica, Nonius). Oni povus multe kaj detale skribi pri tiuj – sed ŝajnas pli konvene ekkoni ilin „surloke", en konkursejoj aŭ rajdlernejoj (eventuale en la Muzeo de Agrikulturo).



Homoj de ĉiuj aĝoj trovas sian distron kun ĉevalo. La junularo abunde frekventas rajdlernejojn kaj klubojn, ne nur en ĉirkaŭaĵo de la ĉevalaroj: en Budapeŝto funkcias tri kluboj de rajdantoj (troviĝas ankaŭ tiucela sporthalo), kaj en la lando *pli ol sesdek rajdlernejoj* servas, foje per veraj „ĉevalprofesoroj" kvarpiedaj eĉ la „plejkomencantojn". Eĉ „eternaj komencantoj" rajtas rajde partopreni la *ĉevalpromenadojn* kaj *grupajn ekskursojn* sur agrablaj terenoj (eĉ plurtagajn) tra belaj regionoj de la lando – ilin organizas vojaĝburooj. Pri *jungaĵ-kondukado* la pokalojn de mondĉampionadoj gajnis ofte hungaroj – precipe per kvaropaj jungaĵoj –, kio klarigas, kial ankaŭ tiu kondukado estas plurloke lernebla en popularaj kursoj.

Aldone eble tie-ĉi ni mencias, ke en la 14a jarcento la ĉarfaristoj en Transdanubia vilaĝo *Kocs* (koĉ) inventis tiutempe gravegan novaĵon: veturilon kun kupeo *sur risortoj.* La veturilo „de Kocs" baldaŭ triumfe disvastiĝis en Eŭropo pro sia leĝereco kaj eminenta agrableco, kaj kunportis la nomon de la origino: H *kocsi,* G *Kutsche,* F *coche, calèche,* A *coach,* E *kaleŝo* kaj *koĉero* ktp. Kial do miri, se koĉeradi tradicie restis populara, samkiel la tuttagaj rajd-turniroj, i.a. ekzemple sur la fama stepo *Hortobágy,* aŭ apud la fortikaĵo de *Nagyvázsony.*

Por la sporto servas pli ol 5 mil selektitaj, valoraj ĉevaloj, plejparte por rajdi. Ilian eliton kompreneble forte edukas la konkursoj, kiuj cetere stimulas aĉetantojn el multaj landoj akiri por si konkursajn kaj generĉevalojn. La speciala sport-entrepreno havas en la ĉefurbo 3 konkursejojn, inter kiuj la *Trot-kurejo* troviĝas proksime de la Sporthalo Budapest (kiu mem estas konstruita surloke de iama ĉevalkonkursejo). Dum la jaro pli ol 100 konkursotagoj, kun granda programo, estas vizitataj de la publiko. La *Galopkonkursejo* abunde utiligas la speciale trejnitajn purrasajn ĉevalojn dum la multaj kolorplenaj kaj tre distraj konkursotagoj. Urborande, en *Alag* troviĝas la granda *obstakla kurejo* por la fame saltkapablaj ĉevaloj, kiuj ankaŭ eksterlandajn konkursojn ofte partoprenas. Kompreneble multfoje venas el aliaj landoj ĉevaloj el inter la plej eminentaj, do la Budapeŝtaj konkursejoj vidas plejofte tre akrajn luktojn de ĉevaloj kaj rajdistoj. Apud ili – kiel kutime en hipodromoj – ankaŭ la bonŝanca publiko povas gajni...

Ervin *Fenyvesi*

Por havi komunan konscion

„Ĉirkaŭ noktomeze li aŭdas bruon de muelŝtonoj, kvankam pli frue li ne vidis muelilojn. Li miris forte, kio estas tio? Kaj la virino, kiu turnadis la muelilon, ĝuste tiam ekkantis. Kaj plene kun miro la episkopo turnis sin al Walther: «Walther, ĉu vi aŭdas la simfonion de la hungaroj, kiel ĝi sonas?» Kaj ili ambaŭ ridis pri la kanto."

Tiu teksto devenas el legendo pri episkopo Sankta Gerhardo, kiu vivis en la dek unua jarcento.

La droninta kulturo

Estis longe firma opinio, ke la hungara estas senparenca popolo. János Sajnovics malkovris nur en 1768, ke la lapona lingvo similas la hungaran. La postaj sciencaj esploroj pruvis, ke la hungara lingvo apartenas al la finno-ugra lingvofamilio, al ties ugra branĉo kune kun la vogula kaj ostjaka lingvoj. La loko de la praa patrujo eĉ hodiaŭ ne estas precize difinita. Verŝajne la praa tribo kun la aliaj parencaj popoloj vivis inter la kurbo de Volgo kaj la montaro Uralo. La vivoformon de ĉasado kaj semkolektado ili ŝanĝis eble antaŭ dumil jaroj je nomada bestbredado, kiu postulis senĉesan migradon. Ilia supozita vojo estis: Levedio (okcidente de rivero Don) – Interriverejo Dnepro-Malsupra Danubo – Hungario. Dum la longa migrado ili kontaktis diversajn bulgarajn, turkajn, iranajn, slavajn popolojn, ĝis ili alvenis sur la nuna teritorio de Hungario. Kaj ĉi tie en la jaro 1000 ili konvertiĝis al la kristanismo.

Ni povas vidi, ke post tiom da tempo, tiom da influoj de aliaj popoloj, eblas eĉ ne konturi la praan kulturon. La romkatolika eklezio, kiu malpermesis la paganajn kantojn, kompreneble ne surpaperigis tiujn.

„La virino, kiu turnadis la muelilon, ĝuste tiam ekkantis"

Tiel ni povas nur supozi pri kelkaj tekstoj, ke ili devenas el la praa epoko. Ĉi tiuj ritaj, sorĉaj kaj laborkantoj temas pri ĝojoj kaj angoroj de homo ne komprenanta la fenomenojn de la naturo, socio. Supozeble ni trovas praajn spurojn en la plorkantoj, infankantoj, enigmaj rimaĵoj kaj porokazaj sorĉkantoj. Staru ĉi tie nur unusola pagana fragmento (ĉar ne estas hungare klare komprenebla, nur en kruda traduko): „Orfa bovido senpatrina / dezerta garbejo (ejo? loĝejo? ĉambro? domo?) netegita / ses okuloj de tri paseroj / karba (malpura? brila? aĉa?) pajlofasko (cervido? kapreolido? restaĵo?) nigra." Laŭ la poeto Sándor Weöres, la teksto ŝajnas restaĵo de pagana entombiga ceremonio. Ĉu la patrino mortis? Ĉu temas pri la mita bovindiino, kiu simbolas la jaron kaj mortas aŭtune? Cetere la fragmento restis kadre de novjara bondezira kanto! La „garbejo netegita" povas esti kaj la tombo ankoraŭ malplena, sed ĝi povas esti ankaŭ la mondo mem! Laŭ la superstiĉo de niaj prauloj la animo estas birdoforma, sekve verŝajne la bonaj animoj, spiritoj estas petitaj por gardi la mortinton. Sed la lasta verso! Ĉu la mortinto estas la pajlofasko aŭ ankaŭ la sankta besto de la hungaroj, la cervido estas invokita? Nur menciinde, ke la mortinto ofte estis per karbo nigrigita, per karba akvo lavita por forpeli la malbonajn, damaĝajn spiritojn. (Eble niaj nehungaraj legantoj konas iun similan tekston. Per alsendo ili tre multe helpus solvi ĉi tiun enigmon.)

Sed ni revenu al nia temo! En la mezepoko ankaŭ en Hungario la latina estis la oficiala lingvo, la skribita literaturo naskiĝis en tiu lingvo. La latinajn legendojn multfoje saturis kelkaj verŝajne praaj legendoj. Ekzemple pri la iama matriarkato aludas la legendoj pri la Mirakla Cervo, pri la ĉeftribestro Álmos. El la postaj epokoj devenas la legendoj pri la Blanka ĉevalo, pri la herooj Botond kaj Lehel.

Jarcentoj de la silento

La paganaj ribeloj estis sange subpremitaj, kaj en la Hungara Reĝlando regis la animojn la romia kaj la bizanca eklezioj. La hereditaj, persekutitaj


VADRÓZSÁK.

SZEKELY

NÉPKÖLTÉSI GYŰJTEMÉNY.

KRÍZA JÁNOS.

ELSŐ KÖTET.

KOLOZSVÁRTT.

1863

La unua scienca eldono de la hungaraj popolkantoj en Hungario

kantoj kaj legendoj povis nur kaŝe, sekrete ekzisti. Sed ankaŭ tiuj multfoje pleniĝis per kristanaj enhavoj; ŝanĝiĝis la praaj figuroj je sanktuloj kaj anĝeloj, kvankam la ceteraj vortoj kaj mem la konstruo restis. Kaj ankaŭ la melodio kaze de la kantitaj tekstoj. En la monaĥejoj, kie la tiutempa kulturo prosperis, la latina estis la kutima. Multaj historioj estis transprenitaj de okcidento (la bizanca influo iom post iom malfortiĝis). Kaj tio metis la bazon de la nova hungara literaturo. Ĉar al la popolo latine nescianta oni devis tamen-tamen nacilingve prediki! Kaj ankaŭ la preĝejajn kantojn oni devis traduki. Sed ĉio ĉi naskis novan direkton en la hungara kantoarto: aperis la migraj kantistoj amuzantaj la nobelajn sinjorojn, dum la abundaj festenoj. Ili prikantis la heroajn farojn, historiajn agojn kaj okazaĵojn (ili estis iasence revolucie novigis la muzikpedagogion kaj -arton. Ilia kvinvoluma kolektaĵo estas eĉ hodiaŭ bazo por la sciencaj esploroj.

Skiza biontologio

La hungara popolpoezio ne estas iaspeca izolita formaĵo, ĝi evoluis kune kun tiu de la najbaraj popoloj. Sekve ni trovas multajn similaĵojn ne nur en la melodioj, sed ankaŭ en la tekstoj. Krome ni trovas t.n. migrajn temojn eĉ el foraj landoj. La popola poezio estas do iusence la kunliga komuna konscio kaj konscienco de ĉiuj popoloj. Iam en la futuraj jarcentoj eble realiĝos la komuna pritaksado de la folklora heredaĵo de ĉiuj popoloj en Eŭropo kaj Azio, kaj en la aliaj mondopartoj. Eble Esperanto povos servi kiel perilo por prezenti sur pluraj dekmiloj da paĝoj (ĉu nur?) la variecon kaj belecon de niaj popolkantoj. Nun sufiĉu skizi la ĉefajn trajtojn kaj prezenti kelkajn specimenojn.

La popola literaturo aperas kiel parto de la kompleksa mondo ĉirkaŭanta la homojn. Per siaj specifaj rimedoj ĝi kompletigas la signosistemon konsistantan el objektoj, agoj. Sed tiu buŝa parto de la simbolarto ankaŭ mem estas kompakta unuo. Ĝiaj ĉefaj elementoj estas la proza kaj la versa branĉoj; kiel suprasegmentaĵo konstruiĝas sur ilin ambaŭ la melodio, kiu kaze de la poemoj aperas ankaŭ aparte kiel instrumenta muziko. La melodio de la recitaĵoj ne aperis en tia formo, sed ĝi ankaŭ ĉi tie havis gravan rolon por parkerigi la tekstojn. La limo inter la prozo kaj la versaĵoj ne estas akra. Elementoj poeziaj troviĝas en la prozaĵoj kaj reciproke. La opaj artospecoj havas ekvivalentojn en la alia branĉo. La prozaj legendoj kaj mitoj aperas paralele kiel poeziaj baladoj kaj heroaj kantoj. La proverboj estas ofte versaj, la enigmoj same kaj ankaŭ la tekstoj de priploro.

Se ni imagas al ni triangulon rektan, kaj ni metas sur la angulojn de la horizontala flanko la *naturon* kaj la *individuon*, sur la supran la *socion*, ni trovas, ke sur la vertikala flanko povas aperi super la individuo (mi) la aliaj personoj laŭvice: vi, li/ŝi, ni, vi, ili. Ni trovas plu, ke sur la skalo laŭ la temo de la popolpoezio plej intensa estas la etapo inter *mi* kaj *vi*. La baza estas ĉi tie la kontakto inter patrino kaj infano, inter geamantoj. La temo nur poste vastiĝas al la pli iaspecaj raportistoj), sed ankaŭ la nobelaj junuloj kaj paĝioj verkis kantojn multe malbenitajn, la t.n. florkantojn. Kaj paralele kiel subtera rojo, inter la „nekulturita" popolo

variiĝas la malnovtipaj kantoj kaj laŭ la praaj normoj ekestas novaj. Kvankam la tiel nomataj (atenton: spegultraduko!) „kantarboj" konis centojn da kantoj, tiuj ne estis fiksitaj en skriba formo ĝis 1782, kiam Mátyás Ráth alvokas la atenton por kolekti ilin.

„Nur el pura fonto"

De la fino de la dek oka jarcento niaj plej bonaj poetoj ne ŝparas la fortojn por kolekti la „kantojn de la plebo". Ferenc Faludi, Mihály Csokonai Vitéz, Mihály Fazekas, Dániel Berzsenyi, Ádám Pálóczi Horváth, János kaj László Arany ktp. kvazaŭ konkure surpaperigas ilin. La nacia konsciiĝo turnas la atenton al la folkloro, kiu penetras ankaŭ en la „altan poezion". Petőfi skribas al sia amiko Arany: „Tamen, la popola poezio estas la vera poezio. Ni strebu ĝin fari la reganta! Se la popolo regos en la poezio, ĝi tre baldaŭ regos ankaŭ en la politiko, kaj tio estas la tasko de la jarcento, kaj tion akiri estas la celo de ĉiuj noblaj sinoj, kiuj jam trovas troa, ke martiras milionoj, kaj kelkaj miloj mallaboras kaj plezuras."

La celo de la poetoj estas – kiel ni povas vidi – fekundigi la paliĝintan kaj malvivan oficialan poezion. Tiuj poetoj plejparte eĉ ne kolektas la muziknotojn.

János Erdélyi aperigis la unuan volumon de la kolektitaj kantoj, sed lia grava kulpo estas, ke – laŭ la tiama Eŭropa kutimo – li multe ŝanĝis la tekstojn, „beligis, ĉizis" ilin. La kompleksan, sciencan kolektadon komencas János Kriza kaj aperigas la rezulton en 1863 „Kampaj rozoj – Sikula popolpoezia kolektaĵo". Pro la eldono li malriĉiĝis, kaj ankaŭ la familio heredis nur ŝuldojn. Tamen lia sinofero ne estis vana. En 1872 Mór Jókai lanĉas la serion Hungara Popolpoezio, kiu konsistis el dek kvar volumoj. Ekagas tiel famaj kolektantoj kiel Lajos Kálmány, Béla Vikár (esperantisto!), Lajos Katona, Elek Benedek, Balázs Orbán kaj multaj aliaj. La plej elstaraj en la vico estas la du geniuloj de la hungara muzikarto: Zoltán Kodály kaj Béla Bartók, kiuj „ĉerpante nur el pura fonto"

Zoltán Kodály, la genia komponisto kaj muzikpedagogo elstaris ankaŭ kiel kolektanto de popolkantoj

altaj skalovaloroj *li/ŝi, ni* kaj *ili.* Tiuj du lastaj estas jam sociaj kategorioj, sed ĉe la unua ĉiuj individuoj kune formas la subjekton, ĉe la dua la aliaj homoj – krom mi – aperas kiel partoj de la socio, sekve kiel ĉirkaŭaĵo de la individuo, do, tiu havas tre similan rolon kiel la naturo. Tamen tiu aperas nur en la pli novaj versaĵoj. La popolpoezio estas origine kuniga, kaj ne disiga (tiu lasta fenomeno aperas nur paralele kun la fremdiĝo, ekspluatado). La kantanto kaj la aŭskultanto identiĝas. La saman fenomenon ni trovas ankaŭ kaze de la tria angulo: naturo. La natura bildo ĉiam aperas, la aganto estas en nedividebla unuo kun la naturo. En la praa poezio en la naturo fokusiĝas ankaŭ la transcendaj fortoj, sed poste la transcendaj fortoj disiĝis de la *naturo* kaj moviĝis al la angulo *socio.*

Nun ni rigardu konkrete nur la poezian branĉon! Teknike la baza formo estas la dutakta oksilabo, el ĝi formiĝis poste la tri- kaj kvartaktaj versoj. La enkonduka bildo estas prenita el la naturo, tiel certigante la paralelon inter la internaj kaj eksteraj motivoj. La amkantojn same kiel la paŝtistajn aŭ la soldatajn kantojn karakterizas realismo, ĉiam sen sentimentaleco. Elstaran valoron reprezentas niaj baladoj kun siaj formbeleco kaj enhavriĉeco (Kata Kádár, Anna Molnár, Kelemenné Kőmíves k.a.)

La scienco dividas la popolkantojn en 47 branĉojn. Eĉ nur vicigi ĉiujn ni ne povas. Ni povas grupigi ilin laŭ la periodoj de la homa vivo. Virina, patrina voĉo ŝvebas unue super nia lulilo kaj virina voĉo laste super nia ĉerko. La lulkantoj kaj plorkantoj estas virinaj artoj. Estas interese, ke intertempe ni aŭdas la voĉon de la virinoj nur en la amkantoj, kvankam tie jam fortas ankaŭ la vira voĉo. La virinoj ekparolas nur ĉe la gravaj turnpunktoj de la vivo. Kaj ni viroj ĉiam en la ceteraj kazoj. Ni pretas entrepreni la ĉefrolojn en la opaj eventoj, en la *signifaj tagoj,* en la laboro kaj en la drinkado. En la mokado ambaŭ seksoj estas same fortaj.

La homoj ĉiam kantas: ludante kiel infanoj, festante, laborante, batalante. Gaston Waringhien eksentas ĉe iu hungara infankanto, ke ĝi gardas iujn malnovegajn simbolojn. Kaj li pravas: inter la infanpoemoj aperas la fruaj am-, sorĉ- kaj eĉ maldecaj kantoj. La porokazaj kantoj, kontraste al la ĉiutagaj infanaj kaj laborkantoj, ligiĝas al elstaraj datrevenoj, kiel la nova jaro, karnavalo, printempo, pasko, rikolto, Kristnasko ktp. Ili certigas pli altan animstaton konvenan al la festo, ili estas vojmontraj „manlibroj" por la homaj periodoj. Kaj kion pri la profesiaj kantoj? Nun ni povus denombri ĉiujn laborspecojn kaj metiojn de la gildoj ĝis la agrikulturaj kooperativoj. La noktogardistoj same havas specifajn kantojn kiel ankaŭ la rubaĵliveristoj.

Kio plu?

Diference disde kelkaj aliaj popoloj (rusa, albana, sudaj slavoj), en Hungario nuntempe ne naskiĝas novaj popolkantoj, aperas eble nur variantoj de la malnovaj tekstoj akordigitaj al la aktualaĵoj. Laŭ mia opinio (sed tio estas nur persona opinio) en niaj tagoj estas spertebla, ke ekis iu nova procezo: la interŝanĝo de la kantoj inter fremdaj popoloj per la helpo de poetoj. Esperanto en tiu evento nepre partoprenis jam ĝis nun, sed verŝajne en la futuro ĝi devos pli intense peri. Ni esperantistoj havas ion, kion la ceteraj homoj ne. Kaj tio estas, ke ni estas partoprenantoj de la etoso, dume por la aliaj la popolkantoj aperas kiel paperaĵo.

Imre *Szabó*

Iŝtvan Fogaraŝi
(Popola balado)

Sidas en fenestro Istvân Fogaraŝi,
apud lia flanko fratineto lia.
„Ĉu vi aŭdis famon, fratineto kara,
mi vin devas doni en Turklandon grandan
fianĉine al la turksultano granda.”
„Mi ne aŭdis famon, frato mia kara,
donu Di' prefere gajan vespermanĝon,
post la vespermanĝo molan malsaneton,
en mateno punca pason el la vivo.”

Jen, deziron ŝian Dio priaŭskultis,
donis al ŝi Dio gajan vespermanĝon,
post la vespermanĝo molan malsaneton,
en mateno punca pason el la vivo.

Venis, jen alvenis turksultano granda,
„Kie estas, kie, fianĉino kara?”
„En ĝardeno flora plantas ŝi la florojn.”
Iris, jen aliris turksultano granda.
Kaj jen, ĉiuj floroj forvelkinte flavas,
kaj nenie estas lia fianĉino.

Venis, jen revenis turksultano granda,
„Kie estas, kie, fianĉino kara?”
„Ŝi sin vestas en la dom' de virgulinoj.”
Iris, jen aliris turksultano granda,
kaj jen, virgulinoj sin funebre vestis,
fianĉino kara katafalke kuŝas.

„Donu al mi, donu, bofrat' Fogaraŝi,
donu amatinon, fianĉinon karan.
Mi por ŝi farigos marmorŝtonan ĉerkon,
kaj ĝin igos tegi per funebra tolo,
kaj ĝin igos najli per orkapaj najloj,
igos ŝin funebri per soldatoj sesdek.”
„Sed mi ŝin ne donas, turksultano granda.
Ankaŭ mi farigos marmorŝtonan ĉerkon,
kaj ĝin igos tegi per funebra tolo,
kaj ĝin igos najli per orkapaj najloj,
igos ŝin funebri per soldatoj sesdek.
Ŝi ripozu pace kun patrino, patro,
kun patrino, patro, en la naskotera.”

(Tradukis : Kálmán Kalocsay)

Rozo kara
(Popola danckanto)

Rozo kara, ne atendu plu,
vokas nin la kanto,
la muziko nin obsedas du,
logas ek al danco.
/:Venu, venu, ho mia kara,
flugu jam nia kanto gaja,
tiel belas la vivo.:/

La cimbalo jen vibrigas sin,
violono revas,
la alia kuraĝigas ĝin,
fluta sono ŝvebas.
/:Amo via en danco ardas,
mia koro pro ĝojo saltas,
ĉiam nove, denove.:/

Oni nutras flamon
(Megrakják a tüzet)

Oni nutras flamon,
tamen ĝi forfalas,
ja ne estas amo,
kiu ne forpalas.

Nutru, kara, nutru,
viajn brilajn flamojn,
povu mi varmigi
miajn feblajn manojn.

Kantas la kukolo,
venas lum' aŭrora,
Dio kun vi kara,
nun vi restos sola.

Amo, granda amo,
malbenata flamo,
kial vi ne floras
sur ĉiu platano?

Steloj, brilaj steloj
(Csillagok, csillagok)

Steloj, brilaj steloj, via lumo ridu,
ĉi junulon timan sur la vojo gvidu !
Sur la vojo gvidu ĉi junulon timan,
ke li trovu fine domon amatinan !

Nian domon...
(Házunk előtt, kedves édesanyám)

Nian domon, kara patrineto, gardas arbo silenta,
ŝirmas ĝi min, kara patrineto, en la pluvo torenta;
densas ĝia foliaro kun bonodoro,
pro junulo (knabino), kara patrineto, min ne trafas doloro.

Super domo, kara patrineto, brilas densa stelaro,
ankaŭ al mi, kara patrineto, brilas bela stelparo;
ankaŭ de mi oni tiun stelon envias,
kiu tra fenestro de la kara jam tri jarojn enbrilas.

(Tradukis: Imre Szabó)

Tri geaktoroj pri siaj planoj

Du aktorinoj, unu aktoro-reĝisoro. Tri diversaj karakteroj homaj kaj artistaj.

Ildikó Pécsi – unu el la plej konataj hungaraj geaktoroj, havanta diversajn honorigojn, rolinta en multaj teatraĵoj, filmoj (kinejaj kaj televidaj). Kálmán Szabó – talenta ano de Literatura Teatro „Miklós Radnóti". Li ankaŭ reĝisoras en la Hungara Radio. Gabi Jobba – artistino kun originala talento, havanta siajn apartajn principojn pri la arto teatra.

La tri geartistoj similas en tio, ke ili ĉiuj ĉi-jare konatiĝis kun Esperanto, ludis en la Internacia Lingvo kaj planas daŭrigi tiun laboron.

Ildikó Pécsi: „Emocie mi centprocente esperantistas"

– Antaŭe kion Vi sciis pri Esperanto?

– Preskaŭ nenion. Kvankam mi aŭdis pri ĝi, sed tio ne tuŝis min.

– Kaj kio okazis poste?

– Poste reĝisoro László Romhányi invitis min al plenumi la rolon de Ina en la teatraĵo „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?" Kiam evidentiĝis, ke mi devos ludi Esperante, mi diris: „Ĉu ne estas egale, kion mi parkerigas? Ĉu la tekston de Ŝekspir-heroino aŭ tiun de rolulino en iu Esperantlingva teatraĵo?"

– Kaj nun kiel Vi vidas la aferon?

– Se la fina rezulto, nome la teatra ludo estas bona, oni forgesas pri la intertempe aperintaj malagrablaĵoj. Mi jam ne memoras, kiel ni interkriadis en la maltrankvila atmosfero de la provoj. Kaj ĉio finiĝis en Antverpeno.

– Kiajn travivaĵojn Vi havas el la UK?

– Vere mi ne havas travivaĵojn, ĉar preskaŭ dum la tuta tempo ni provludis. Eĉ bone irantan prezentaĵon oni devas provi, se ĝi estas prezentota aliloke, des pli validas tio okaze de ludo, en kiu estas partoprenontaj pluraj novuloj. Kion mi tamen vidis kaj kio plaĉis, tio estas la multkoloreco de la kongresejo. Por mi tio pruvis definitive, ke Esperanto taŭgas por esti ĉie uzata. Anoj de diversaj popoloj parolis unu kun la alia sen ia ajn komplekso pri malplia valoro.

– Kiel vi statas pri la lingvolernado?

– Kvazaŭ lerneja bubaĉo. Mi portadas kun mi la libron „Esperanto dum 30 tagoj", foje-foje mi eĉ lernas el ĝi iom. La gramatiko simplas, nur mian vorttrezoron mi devus ampleksigi. Sed mi pensas: se mi ellernos tion, kion mi devos prezenti antaŭ la publiko, mi havos grandan vortdeponon, kiu estos helpo ankaŭ por paroli.

– Kion Vi ludos Esperante?

– La „Profeto" restos sur nia programo, mi projektas kanzonvesperon kun 50-70 minuta programo, kaj ni deziras prezenti la teatraĵon de Ákos Kertész „Kiu riskas, tiu gajnas".

– Pri kio?

– Tio estas teatra ludo pri „ama triangulo". La edzino kaj ŝia amanto estas geamontaj, kiam alvenas la edzo, kaj komenciĝas la teatraĵo.

– Kia estas Via rilato al Esperanto?

– Mi pensas, ke estus bone, se realiĝus, kion volis Zamenhof. Estus grandioze, se la homoj per tiu ĉi Internacia Lingvo komprenus unu ĉa alian.

– Kiomprocente Vi konsideras Vin esperantisto?

– Emocie cent, lingve ankoraŭ malpli.

Kálmán Szabó: „Ekscii, kiel ni devas vivi"



– Kiel Vi konatiĝis kun la Internacia Lingvo?

– Kiam iris la preparoj de la printempa Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj, kaj komenciĝis la provoj de

„Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?", tiu kolego, kiu devus ludi Ernestron, laŭ la preteksto de alia okupiteco rezignis pri la rolo.

– *Kiel Vi komencis labori?*

– Unue mi trastudis la broŝuron „Baza Esperanta Konversacio por Turistoj", la faman BEK. Jam tiam ekplaĉis la preskaŭ geometria logikeco de la Internacia Lingvo. Poste mi aĉetis libron de Jozefo Horváth „Esperanto dum 30 tagoj". Unu monaton daŭris, ĝis mi atingis ĝian finon. Mi iam lernis la latinan, tial mi konis la fundamentan parton de la vortaro. Dum mi lernis, tagenokte parolis la magnetofono. Laŭ la sugesto de Jozefo Horváth, mia loĝejo estis plena de surskriboj sur la mebloj kaj la ĉiutage uzataj aĵoj. Tiel mi ellernis grandan parton de la plej ofte uzataj vortoj.

– *Kial Vi pensis, ke tio estas necesa?*

– Mi volis kompreni eĉ la plej delikatajn strukturojn. Unue helpe de vortaro mi tradukis laŭvorte la tekston de la rolo. Mi opiniis: se mi ellernos naĝi en la profunda akvo, tiam mi sukcesos ankaŭ en tiu ĝistalia. Tial mi komencis la memorigon ĉe la granda monologo de Ernestro. Ĉiuvespere, antaŭ la enlitiĝo mi recitis ĝin. Finfine tiun mi sciis plej bone.

– *Laŭ Via opinio, ĉu Vi jam bone parolas Esperante?*

– Tion mi ne kuraĝas diri. La ĝeneralan lingvaĵon mi ne konas sufiĉe. Laŭ mi eĉ la plej komplika faka teksto estas pli facila, se oni konas la koncernan fakon, ol memstare peti glason da akvo. Traduki, legi mi scias relative bone, sed paroli estas malfacile.

– *Kiuj estas Viaj planoj?*

– Mi volus lukti kun la lingvo kaj la drama materialo sur du kampoj. Unue kiel rolanto de teatraĵoj. Mi ankaŭ estonte ludos Ernestron, sed paralele mi preparadas min al monodramo de Samuel Beckett. Ties titolo estas: „La lasta magnetofonbendo de Krapp". Aliflanke mi volas reĝisori la surscenigon de la antologio „Mortintoj de la rivero Spoon" far Edgar Lee.

– *Kial Vi elektis ĝuste tiujn du verkojn?*

– La du pecoj multe similas unu la alian. Forme: ĉiu poemo de la „Mortintoj" montras vivsorton de homo. Ili vere estas monodramoj. Enhave: en tiuj ĉi verkaĵoj aperas la samaj problemoj, kiuj en la Beckett-verko.

– *Kaj kial ili meritas la Esperantlingvan prezentadon?*

– Mi estas konvinkita, ke lingvo internacia kaj ties movado ne nur lingve, sed ankaŭ spirite devas pliproksimigi la homojn. Kaj ne ekzistas problemo pli ĝenerala ol tiu: kiel oni devas vivi. Ambaŭ verkoj esploras: kiel oni fuŝas sian vivon. La granda instruaĵo de la menciitaj verkoj estas: se oni ne povas jam ami la alian homon, oni almenaŭ devas ellerni, kiel toleri lin, anstataŭ krei vivofremdajn kategoriojn.

– *Kio estas Via celo pere de tiuj prezentadoj?*

– Montri, kiagrade oni ne scias vivi kaj helpe de tio eble iam ni ekscios ankaŭ tion, kiel oni devas vivi.

Gabi Jobba: „Necesas komunikilo por la homoj"

– *Kion Vi sciis pri Esperanto?*

– Tiom, ke ĝi ekzistas, ke ĝiaj celadoj estas honestaj, ĉar ĝi volas kunigi homojn pere de lingvo komuna.

– *Kiel Vi kontaktiĝis kun tiu ĉi lingvo?*

– Hazarde. Ĉi-jare la unuan fojon estis aranĝita en Budapeŝto Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj. Enkadre de tiu nia trupo sub la reĝisorado de István Iglódi prezentis la dramon de Boris Vasiljev: „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj", kies Ritan mi jam ludis antaŭ pluraj jaroj. Mi entreprenis la laboron ankaŭ internacilingve.

– *Ĉu Vi nekonsideris la taskon tro malfacila?*

– Mi pensis: la vorttretoro de Esperanto enhavas multe da elementoj el diversaj lingvoj, ĝi do ne estos tro malfacila por mi. Cetere, mi jam havis similan taskon, kiam mi ludis la rolon de Sally en la fama „Kabaredo" – germane. Pro tio mi sufiĉe bone ellernis paroli en tiu idiomo.

– *Kaj kio okazis ĉi-kaze?*

– Dum la preparado mi ne posedis tempon por enprofundiĝi en la lingvon, des pli, ĉar dumtempe bruis ĉirkaŭ ni la teatra vivo.

– *Nun kion Vi preparas?*

– Mi prezentos Esperantlingvan recitalon pri Sándor Petőfi, pri tiu poeto hungara, kies nomo estas tutmonde konata. Mi kompilis kaj recitis ĝin hungare antaŭ dek jaroj.

– *El kio konsistas tio recitalo?*

– Prezentante la vivon kaj la verkojn de Petőfi, mi volas montri lin kiel poeton, homon kaj revoluciulon. Mi citos el la samtempaj kritikoj pri li. La programo temas ankaŭ pri tio, kiel postvivis la granda poeto en la memoro de la popolo hungara; dum la kolekta laboro, antaŭ la kompilado mi renkontis popolkantojn, kiuj originale estis Petőfi-poemoj, kaj ne eblis distingi en ili la folkloron disde la verkoj de la poeto. Serĉante tiajn kantojn, mi faris veran etnografan laboron, en kiu multe helpis min granda hungara folkloristo, Zoltán Kallós.

– *Kion Vi volas fari por la sukceso?*

– Mi dum unu monato volas sufiĉe bone ellerni Esperanton kaj dum unu monato mi parkerigos la recitalon, kiun cetere mi prezentos tute sola, sen helpo de sufloro, kiel mi faris tion hungarlingve.

– *Ĉu Vi vidas iun perspektivon de la Lingvo Internacia?*

– Se mi ne vidus, mi ne ekfarus ion en ĝi. Mi kredas, ke ĉial necesas iu komuna lingvo por ke la homoj povu komuniki. Mi konsideras terura problemo, ke oni veturas eksterlanden, ne havante komunikilon. Tio por ni, hungaroj aparte gravas. Nia malfacile akirebla idiomo estas portanto de kulturo riĉa, kaj ekzistas rimedo, atingebla por ĉiu, kiu povas funkcii ankaŭ kiel peranto de niaj valoroj kulturaj. Mi pensas, ke se eĉ ne en la proksima futuro, sed en la vivo de niaj nepoj Esperanto estos vaste instruata kaj ankaŭ mi povas kaj volas kontribui al tio.

P.A. *Rados*

ORIGINALA POEZIO

E .R. Mity

Sopiro

Mi vin adorus kiel ardan sunon
eĉ malgraŭ mankoj kaj kaprico eta,
se iam vi alvenus en brakumon
de l' homo, kiu ĉiam estas preta

amegi vin. Por mi vi estus fonto
de l' riĉ', helpanta vivon retrasenti;
alvenu, por ke iam en estonto
mizeran scion povu mi transcendi.

Jes, ankaŭ mi ne estas ul' sen manko,
eĉ nun konsolon serĉas ĉe aliaj.
Sed ja ne kompareblas frida sango
ilia kun inspiraj donoj viaj!

Sen vi mi estas kiel griza tago,
kaj sur animon pezas morna tristo,
nur iam, se en revo aŭ imago
mi havas vin, serenas la ekzisto.

Alvenu do! Kun vi, ho mia kara,
esperos mi pri nova perspektivo,
ĉar mia viv' sen vi ja tre amara
nun estas adorata, fora PIVo.

Clelia Conterno Guglielminetti

Adolesko

Kiel granda kaj bela mi vin vidas
eliri el baraktoj infanecaj,
kun kia miro mi rigardas vin
dum vi iĝadas nova nuna vi...
Jam sekas en angulo
krizalido de l' nobla papilio,
kaj tamen nur hieraŭ
ĝi nigris hirte, pike,
kaj ŝajnis nura vivoformo via –
Ho kial mi ne havis
fidon kaj atendadon paciencan?
Kial kontraŭis mi la renaskiĝon
de vi malsama, bremsis la malfermon
de via krizalido adoleska?
Mi sentis kaj suferis la barakton,
kaj la frapoj ne estis kontraŭ min,
sed kontraŭ la pariojn krizalidajn –
Ĉu vi pardonos, ke mi ne komprenis
vian klopodon renaskiĝi nova?
Kaj estus mi devinta beni tiun
suferon, kiel benis mi iame
l' alian, la similan suferadon
de l' nasko, tiun nokton ferbruaran...

Aldo de' Giorgi

Ne malpermesu al mi

Mi petas vin humile,
karaj amikoj kaj kontraŭuloj;
ne malpermesu al mi
la rajton erari!
Ne kondamnu min
al monotono de perfekteco!
La bona Dio, ja,
ne kreis min perfekta,
... cetere nek la mondon.

Mi petas vin:
lasu min ami la infanojn,
kiuj eraras ĉiupaŝe,
„lasu min adori la virinojn,
mirinde senkoherajn
kaj malfidelajn,
ĉar ili donacas al ni
la delicajn suferojn
*de soleco."**

Ho, lasu min panegiri
por tiuj, kiuj aŭdacis,
eĉ se misvoje.
Lasu min kanti por Ikaro,
por Odiseo kaj Don Kiĥoto.
Ne forgesu, ke
Nobel kaj Fleming
faris eventajn eltrovojn
pro hazardaj eraroj.
Agnosku:
kiel plata, enua
estus la vivo
se ĉio estus ĝusta,
se ĉiu prava.
Kiel seka, senalloga
estus Esperanto
estus Esperanto
se ĝi estus senmanka.

Sed, dum kunvenoj, vi grumblas malŝate
ĉar mi fumas,
kaj tion malpermesas al mi.
Tamen, verdisme,
vi predikas toleremon.
Do, ne malpermesu al mi
foje deflankiĝi de prudento,
de deco, de racio.
Por ke vi povu fieri
pri via saĝo
ne malpermesu al mi,
mi petas,
la rajton erari.

* Citaĵo el J. Jevtuŝenko

Tra la famaj kafejoj de Budapeŝto

Kara Leganto kaj estonta Kongresano de la 68a UK, se iuj kongreskunsidoj iĝos longaj kaj enuaj, kaj ekstere forte brilos la aŭgusta suno, provu iom ĝui la silenton kaj trankvilon de Budapeŝtaj kafejoj. En Budapeŝto – urbo kun dumiljara historio – ankaŭ la kafejoj havas siajn tradiciojn kaj eĉ nun multaj el ili zorge kaj fidele gardas la atmosferon de tiu tempo, kiam en tiuj ĉi kafejoj renkontiĝis famaj hungaraj verkistoj, poetoj, artistoj.

Proksime al la Budapeŝta Universitato, en la mallonga strato Városház troviĝas restoracio *„Pilvax"*. Nun ĝi estas eleganta restoracio, sed antaŭ pli ol unu jarcento *„Pilvax"* estis granda Budapeŝta kafejo. En la kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento en tiu ĉi kafejo ŝatis kunveni la hungara revolucia junularo. Ĉi tie, inter la multaj junuloj, studentoj, ĵurnalistoj, artistoj, oni ofte povis vidi la famajn hungarajn verkistojn Petőfi kaj Jókai. Kafejo *„Pilvax"* iĝis historia, ĉar en 1848 oni proklamis ĉi tie la Hungaran Nacian Revolucion kaj unue ĉi tie oni tralegis la deklaron „Kion deziras la hungara popolo", kaj staranta sur unu el la grandaj rondaj tabloj Petőfi inspire deklamis sian poemon „Nacia Kanto".

Se kafejo *„Pilvax"* ligiĝis kun la nomoj de Petőfi kaj Jókai, kafejo *„Hungaria"*, kiu unue nomiĝis „New York", gardas la rememoron pri plej talentaj hungaraj verkistoj el la komenco de nia jarcento. Tiu ĉi fama kafejo, kiu situas sur bulvardo Lenin 9-11., ankoraŭ nun ravas nin per sia impona interna arkitekturo. La marmoraj muroj kaj kolonoj estas riĉe ornamitaj kaj sur la volbaj plafonoj, koloraj freskoj interpretas bibliajn kaj mitologiajn motivojn.

Regula gasto en la kafejo estis Ernő *Osvát,* redaktoro de la fama literatura revuo „Nyugat" (Okcidento). La kafejon ofte vizitis Zsigmond *Móricz,* Dezső *Kosztolányi* kaj aliaj konataj verkistoj. Venis tien ankaŭ famaj eksterlandaj gastoj, kiel Thomas Mann kaj Ŝaljapin.

Oni eĉ rakontas, ke iam ĉi tie, kune kun la aroma kafo, la gastoj povis ricevi paperon, inkon, skribilon, ja la kafejo estis literatura kafejo, sed delonge jam oni ne plu servas ĉi tie paperon, inkon, skribilon. Ĉu la kelneroj forgesis tiun bonan tradicion aŭ jam malaperis la poetoj kiuj dum horo aŭ du povis verki belan poemon en la silento de la kafejo? Nun eta ekspozicio el karikaturaj portretoj de konataj hungaraj verkistoj rememorigas al ni, ke iam kafejo *„Hungaria"* estis vigla centro de Budapeŝta literatura vivo.

Ankaŭ *„Gresham"* estas malnova eleganta Budapeŝta kafejo. Ĝi troviĝas sur placo „Roosevelt" 5. kaj inter la du mondmilitoj la kafejo estis ŝatata kunvenejo de hungaraj pentroartistoj. La kafejo donis ankaŭ la nomon de la pentroartista rondo „Gresham-rondo", kies plej elstaraj reprezentantoj estis István *Szőnyi,* Róbert *Berény* kaj Aurél *Bernáth.*

Tamen ni ne restu longe en la *„Gresham"*-kafejo. Ni daŭrigu nian promenon. Antaŭ ni arĝentas Danubo kaj sur la alia bordo de la granda rivero, verdas la montetoj de Buda. Ankaŭ tie, inter la romantikaj domoj de la malnova urbo, troviĝas kelkaj allogaj kafejoj kaj unu el ili estas *„Ruszwurm"*, eble la plej malnova dolĉaĵejo en la burg-kvartalo. *„Ruszwurm"* troviĝas en la strato Szentháromság. Ĝin konstruis ĉarpentisto kies nomo estis Krautszidller kaj dum longaj jaroj multaj personoj posedis la kafejon. Nun ankaŭ ĝi estas ŝtata, sed *„Ruszwurm"*-kafejo ankoraŭ gardas la atmosferon de la 19-a jarcento. La etaj seĝoj kaj tabloj estas faritaj el ĉeriza arbo. En la vitroŝrankoj estas aranĝita malgranda ekspozicio de malnovaj objektoj kaj diversaj iloj, kiujn oni uzis iam en la dolĉaĵmetio.

En la fortikaĵo de Buda troviĝas alia fama moderna kafejo. Ĝia nomo estas *„Korona"* kaj en tiu ĉi kafejo oni kutimas organizi literaturajn vesperojn, en kiuj elstaraj hungaraj geaktoroj deklamas poemojn aŭ prezentas etajn dramojn. Eble multaj rememoras, ke ĉi-printempe dum la Internacia Renkontiĝo de Esperanto-teatroj la literatura-muzika programo „In memoriam Kálmán Kalocsay" okazis en tiu ĉi kafejo.

Malnovaj kaj novaj, sennombraj kaj allogaj estas la Budapeŝtaj kafejoj. Multaj el ili ligiĝas kun ia historia evento aŭ kun la nomoj de famaj verkistoj, muzikistoj, pentristoj ... Kompreneble oni ne povas viziti ĉiujn Budapeŝtajn kafejojn, kaj ne eblas eĉ por minuto ĝui la trankvilon kaj silenton de ĉiu el ili, tamen ili meritas foroferon de unu-du horetoj el tutsemajna Budapeŝta restado.

Georgi *Mihalkov*

Internaĵo de la kafejo Korona

La kafejo-sukeraĵejo Ruszwurm

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

6. La estiĝo de la laborista Esperantista movado

Kiel ni vidis en la antaŭaj artikoloj, la Internacia Lingvo kreiĝis en la jaroj 1887-1905. La internacilingva movado kreis ĝin, lingvigante la lingvoprojekton de Zamenhof.

La sukcesoj, la lingvonormigo en 1905, la stabiliĝo de la lingvo, la multnombriĝo de la esperantistoj kaj aliaj faktoroj stimulis la diferenciĝon de la movado en la postaj jaroj. Aparte interesa historio estas la estiĝo de la laborista esperantista movado, kiel speciala rezulto de tiu diferenciĝo.

Socialdemokratio kontraŭ Esperanto

La teoriuloj de la Dua Internacio tiel simpligis, tiel interpretis la sciencan teorion de Marx, ke la historia procezo en *spontanea maniero* kondukos al la venko de la socialismo en la tuta mondo. Tiu teorio pri la historia spantaneeco *subtaksis, neis la rolon de la konscio.* Laŭ tiu interpreto kontraŭagi al la spontanea historia procezo estas reakcie. Sekve estas reakcie kontraŭagi ankaŭ al la spontaneaj internaciigaj tendencoj. La malgrandaj nacioj devas asimiliĝi kaj komplete malaperi kune kun siaj lingvoj. *Lukti por la nacia kulturo kaj por la nacia libereco estas anakronismo* – asertis ne nur la dekstruloj de la movado, sed ekz. ankaŭ Rosa Luxemburg, elstarulo de la maldekstra alo.

Karl Kautsky, gvida teoriulo de la Dua Internacio, plurfoje tuŝis la problemon de la lingvo de la internacia komunikado. Tute konforme al la menciita historio-koncepto li eksplikis, ke la naciaj lingvoj devas malaperi, escepte unu, kiu, direktata senpere de ekonomiaj fortoj, en spontanea procezo leviĝos al la rango de la Universala Lingvo. Fakte: li konstatis la ekziston de spontaneaj tendencoj, kaj *povis doni nenian programon.*

Nur kiel escepton ni povas mencii la kontraŭmilitaristan Jean Jaurés, kiu taksis Esperanton „la latino de la demokratio". Tamen ne lia slogano, sed lia fiasko estis karakteriza: ĉe la 7-a Kongreso de la Dua Internacio li prezentis la demandon pri „elekto de internacia lingvo por ĉiuj internaciaj socialistaj interrilatoj kaj por internaciaj kongresoj." Dum la prepara kunveno reprezentantoj de la Germania Socialdemokrata Partio estis, kiuj fiaskigis la aferon „kiel nesufiĉe maturan" demandon. Tial ĝi ne ricevis lokon en la tagordo de la Stutgarta kongreso de la Dua Internacio.

Eĉ, estis tempo, kiam la gvidantoj de la Germania Socialdemokrata Partio malpermesis al sia gazetaro kaj speciale al la centra partigazeto *Vorwärts* skribi ion pri Esperanto. Simila taj Domoj. Tiaj *pioniroj* estis i.a.: en Svedio Gustav Edwin Johannson bindisto, en Nederlando presisto Wiebe Nutters kaj masonisto K.H. Meier, en Francio ĉarpentisto Jozef Habert, en Hispanio telegrafisto Valls Sorel, en Ĉeĥio fervojisto Frantiŝek Chaloupecky, en Hungario presisto Izsó Polgár kaj poŝtisto Pál Robicsek, en Japanio presisto Jamaga Taiĵi, en Ĉinio presisto Sifo. Simile iniciatis, organizante laboristajn kursojn, ankaŭ kelkaj intelektuloj, ekz. en Anglio inĝeniero Wilfrid Walwyn Padfield aŭ en Hungario juristo d-ro Rezső Rajczy – poste martiro de la hungara laborista movado.

La unuajn kursojn kutime sekvis kreo de laborista esperantista grupo: Stokholmo (1903 kaj 1905), Frankfurto (1905), Parizo (1905), Amsterdamo (1907), Hago (1907), Berlino (1908), Dresdeno (1908), Hamburgo (1908), Kopenhago (1908), Gotenburgo (1909), Budapeŝto (1910), Vieno (1912) ktp.

Ĝenerale post la kreo de la lokaj grupoj sekvis la fondo de landa asocio, nur en Britio okazis inverse: la movado startis per la fondo de *Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj* (1907).

En Ĉeĥio la laboristaj esperantistoj troviĝis en escepta situacio: la Ĉeĥslava Socialdemokrata Partio rekonis la valoron de la Internacia Lingvo. Sekve estis fondita Laborista Esperantista Asocio (1911), sekcio de la Laborista Akademio en Prago. Post unu jaro ĝi atingis la membronombron 500, sed jam en 2000 ekzempleroj aperis ĝia monata organo *La Kulturo* (1912–1914) kun revoluciema-klasbatala karaktero.

Inter la unuaj fondiĝis la *Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj* (1911), kiu en la komenco de 1913 havis 200 membrojn en du grupoj. La *Hungaria Esperantista Societo Laborista* (1913) unu jaron post sia fondiĝo atingis tiun membronombron en tri grupoj.

En Germanio komence ĉirkaŭ la revuo *Der Arbeiter Esperantist* (1910–1918) ariĝis la laboristaj grupoj. Tiun revuon salutis Zamenhof en 1910 per la jenaj vortoj: „La kampo, kiun vi elektis por Via laborado, estas tre grava; eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero."

Dum la fondkongreso de la *Germana Laborista Esperantista Asocio* (1911) jam 45 grupoj estis reprezentataj, kvankam nur 25 el ili aliĝis kun 600 membroj. La asocio, kies monata organo estis la *Antaŭen* (1911–1913), en 1913 atingis la membronombron 1400 en 70 grupoj. La malaprobo de la Germania Socialdemokrata Partio forte bremsis reliefiĝon de ĝia politika karaktero, la asocio restis en pozicio

Rezső (Ruldolfo) Rajczi (1886-1919)

situacio formiĝis en Nederlando, kie W. van Ravensteyn socialista gvidanto nomis la Esperanto-movadon *„burĝa malsaĝaĵo"*, sed por la laboristoj jam „danĝera ludeto".

La internacieco de la laboristaro venkas

La laboristaro, do, ricevis nenian instigon de supre, de siaj laboristaj organizaĵoj, por lerni kaj uzi la Internacian Lingvon. Kaj tamen: de 1905, dum la rapida kresko de la Esperanto-movado, kreskis ne nur la nombro, sed ankaŭ la proporcio de la laboristaro en ĝi. Kiel tio eblas?

Merito de la socialdemokratio estas, ke ĝi plej vaste disvastigis en la laboristaj medioj la marksisman teorion pri la *internacieco de la laboristaro,* la konscion kaj la sintenon de la *internacia proleta solidareco.* La internaciismo ankaŭ tiutempe restis grava parto de la socialdemokrataj instruoj, kaj, kvankam malpli kaj malpli konsekvence, ankaŭ parto de la socialdemokrata praktiko. Kaj per tiu fakto la socialdemokratio – eĉ se senintence – fundamente kontribuis al la estiĝo de la laborista esperantista movado.

Slogano de la Komunista Manifesto: *„Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!"* multe pli efikis la laboristan klasan konscion, estis multe pli mobiliza faktoro, ol spekulaciaj teorioj pri la lingvo de la internacia komunikado. Ne hazarde, baldaŭ aperis la unua esperantlingva eldono de tiu verko de Marx kaj Engels: en Ĉikago, 1908.

Krome ni ne forgesu, ke en tiu tempo rimarkinde ŝanĝiĝis la sociala situacio de la laboristaro. Sekve de la deviga frekventado de bazaj lernejoj malaperis la analfabetismo en la industriaj landoj, kaj ĉiu alproprigis almenaŭ la *fundamenton de la homa kulturo.* La persistaj bataloj de la laborista movado rezultigis gravan malkreskon de la labortempo. La laboristoj jam disponis je ne malgrava tempo libera, je *produktiva libera tempo,* t.e. tempo por manifestiĝo de la individuo. En faklaboristaj medioj aperis la fenomeno de memklerigo, komence inter la presistoj. La laboristaj organizaĵoj jam posedis minimumajn financajn rimedojn, kaj kreiĝis ankaŭ laboristaj kulturaj societoj.

Renkontiĝis du faktoroj: klopodoj de la kleriĝema, internaciisma laboristar-tavolo al praktika internaciismo, persona interkonatiĝo kun alilandaj laboristoj, kaj klopodo de la jam establita Esperanto-movado por ĉie disvastigi la lingvon.

Pioniroj – grupoj – asocioj

La unuaj laboristaj esperantistoj lernis la lingvon plej ofte en kursoj de la tradiciaj grupoj kaj societoj. Tuj poste ili iniciatis kaj ofte ankaŭ gvidis kursojn en siaj sindikataj ejoj, Laboristde politika neŭtraleco.

En *Francio* inter la pioniroj estis multaj anarkiistoj – ja iliaj teorioj tute ne cedis al la teorio pri la spontaneaj historiaj tendencoj. La historio de la tiea movad-komenco estas tiel komplika, ke ĉi tie mankas loko prezenti ĝin. Same komplike formiĝadis la *japanaj kaj ĉinaj* organizaĵetoj – same sub gvido de anarkiistoj. La dulingva *Ĥina Socialisto* (1913) en Ŝanghajo kaj *La Voĉo de la Popolo* (1913–1916) en Kantono – kie la plej granda grupo estis, kun 300 membroj – estis inter la unuaj ĉiniaj socialistaj revuoj – ne nur esperantistaj.

La unuaj persekutoj

La monata *Internacia Socia Revuo* (1907–1914) estis la plej valora laborista esperantista eldonaĵo. Ĝi disponigis lokon al ĉiuj tiutempaj socialismaj skoloj, publikigante sociajn, politikajn kaj teoriajn studojn. Ankaŭ libroserion ĝi eldonis: la verkojn de Ferdinande Lasalle, Wilhelm Liebknecht, Kropotkin, Nieuwenhuis, Ferri kaj romanojn de Victor Hugo kaj Jack London. Ĝi estis revuo por tiuj, kiuj jam havis altnivelan lingvoscion kaj interesiĝis pri teoriaj demandoj. Sekve dum la unuaj kvin jaroj ĝi apenaŭ havis abonantojn, kaj havis grandan malprofiton. Nur en 1912 komencis stabiliĝi ĝia situacio, kiam ĝi atingis ĉ. 600 abonantojn (pli ol triono el Germanio).

La abonantoj de tiu revuo en la Rusa Imperio jam estis sub strikta observo de la sekreta polico, kiu baldaŭ malebligis pluan disvastigon de la revuo en la Imperio. Cetere: en tiu lando pro la persekutoj kontraŭ la laborista movado eĉ unu laborista esperantista grupo ne povis fondiĝi – krom la „neoficiala" grupo de la malliberuloj en la Vladivostoka malliberejo (1910), aŭ tiu en la fervojaj metiejoj de la rusa Orientĉina Fervoja Kompanio en Ĥarbino (1911), Manĉurio – ĉi tiu, do, jam trans la rusaj limoj.

Persekutoj, ĝenadoj, malpermesoj en la Rusa Imperio pleje, sed multaj ankaŭ en Ĉinio, kaj aperis ankaŭ en aliaj landoj. Ekzemple en Hungario en 1913 la polickapitano de Székesfehérvár malpermesis lerni al laboristoj tiun „ŝtelistan lingvon".

Agoj kontraŭ la laborista esperantista movado iĝis pli oftaj, ol kontraŭ la tradicia movado, kvankam ankaŭ por la lasta neniam mankis malhelpoj.

Ĝis 1914 la laborista esperantista movado disiĝis de la tradicia alo de la Esperanto-movado: el organiza vidpunkto jam preskaŭ komplete, sed nur parte forlasinte la tradician „neŭtralecon" de la internacilingva movado.

Zoltán Kodály, la reformisto de la muzika edukado

La muzikamantoj tutmonde konas kaj ŝatas la orkestrajn kaj ĥorverkojn de Zoltán *Kodály* (kodaj), pri kiuj ni skribis jam en antaŭa numero de HV (1982/3). Tamen ne estas forgesinde, ke la majstro mem konsideris la muzikedukan agadon pli grava en sia vivoverko. Do ĝi nepre meritas almenaŭ skizan konatigon antaŭ niaj legantoj, ankaŭ por ĵeti rigardon al la rilatoj inter muziko kaj kulturo de la popolo.

La jam frue komencita pedagogia agado de Kodály, post la dua mondmilito disvolviĝis kun granda elano. Tiutempe li energie manifestis, ke la muziko devas esti ĉies posedaĵo, kaj ne nur plezuro de privilegiuloj, kiel ŝajnis ĝis tiam. Sed oni devis ankaŭ serĉi la vojon por atingi tiun noblan celon. Kodály direktis la atenton al la muzika edukado: per novaj, alispecaj metodoj estas necese altiri la infanojn al la *vera muziko*, fari ĝin paŝo post paŝo familiara kaj interne plezura ĉe ili, kaj sekve transformiĝos ankaŭ la tuta popola sinteno al la muzikarto.

Jam en 1945 komenciĝis laŭ iniciato de Kodály la aŭdosenton evoluiganta „muzika bazinstruado" en urbo Pécs, kaj baldaŭ la ideo disvastiĝis tra la tuta lando, akirante ĉie rekonon pro la esperigaj rezultoj. Tiun movadon Kodály mem inspiris per ĉiuj rimedoj, kaj apogis la lernenojn per konsiloj, instrukcioj, ankaŭ per publikaj koncertoj sub sia direktado. Okazis foje, dum UNESKO-konferenco en Parizo (1948), ke oni metis la demandon al li: kiam pleje konvenas komenci muzikan edukadon de la infanoj? La surprizaj vortoj de Kodály unue ekridigis la aŭskultantaron: „Naŭ monatojn antaŭ la naskiĝo!" – sonis lia konciza respondo, ŝajne ŝerce. Poste oni rekonis tie pravecon laŭ la klarigo: „La patrino ne nur korpon donas al sia infano, ankaŭ la animon ŝi konstruas el la sia."

La spertoj igis lin rekomendi la plenan transformon de la muzikinstruado ĉe la junularo. Li rimarkis, ke la infanoj, kiuj regule lernas legi muziknotojn, progresas pli bone ankaŭ en aliaj studobjektoj. Baldaŭ li verkis – kun alia eminenta muzikpedagogo – lernolibrojn pri kantado por ĉiuj klasoj de la bazlernejo. Pere de tiuj instruiloj la lernantoj akcele progresis en la t.n. relativa „solfeĝado", kaj la kantado iĝis pli kaj pli populara en la lernejoj.

La elirpunkto de la muzika edukado devas esti la kantado – asertis ofte Kodály. Pere de persistaj eksperimentoj li sukcesis pruvi, ke por taŭga lernado de muzikinstrumentoj oni nepre bezonas pli frue intensan instruadon pri solfeĝado. „Nia ĝisnuna muzikkulturo – diris Kodály – restis nur duonvalora, ĉar ĝi havis nenian rilaton al la kantado. Ni devas do transformi nian tutan muzikkulturon *sur kanta bazo*. Tio signifas, ke neniu prenu instrumenton en la manon, se li aŭ ŝi pli frue ne lernis iomete kanti.

La domo de la Internacia Kodály-Instituto en Kecskemét



La kanto estas la animo de la muziko, ankaŭ de la instrumenta muziko."

Li deklaris, ke la popolamasoj nur tiam povas iĝi muzikantoj, eĉ muzikon komprenantoj, se ili sufiĉe frue havas eblecon lerni la fundamentojn de la muziko – kaj tio eblas sole per kantado, kiel eble plej disvastigata. Li rigardis tre grava la instruadon, ĉar „... sen skribo–lego de muziknotoj en nia tempo muzikanto ne povas jam ekzisti, samkiel sen literatura kulturo. Ne plu troviĝu muzikisto, kiu ne aŭdas la legitajn, kaj ne vidas la aŭditajn , t.e. „vidi" ties muziknotojn. Kodály ankaŭ ofte menciis, ke „la malavantaĝojn de la senkanta edukado eĉ la plej granda talentulo ne povas poste kompensi." Tiuj gvidprincipoj igis lin alceli gravan renovigon de la ĥorkulturo en la tuta lando, kaj por subteni ĝian disvastigon, Kodály decidis prefere verki horaĵojn kaj nur duavice instrumentan muzikon.

La interrilatojn de la popolo kaj muziko Kodály konsideris elstare gravaj. Ni citu denove el liaj vojmontraj frazoj: „... *la arton oni devas alproksimigi al la popolo, kaj la popolon al la arto!* La plej gravan rolon tiucele devas surpreni la ĥoroj. De kiam mi konscie pensas, mi rimarkis, ke la mondo progresas al la komuneca vivformo. Tion *nature prezentas* la ĥora kantado. Pro tio mi dediĉis el mia vivo la pli grandan parton al evoluigo de la ĥor-kantado." Li rigardis realisme la situacion: „Ni havas nur opajn talentulojn, la tuta publiko ankoraŭ ne povis veni al la vera muziko. Ĝuste tial mi okupiĝas sole pri la ĝenerala muzikedukado."

Li ofte argumentis, ke la lernanto devas alveni al la muziko tra la kantado, ĉar tiel li akiras kapablon legi la muzikon, kio multe faciligos kompreni la majstroverkojn. Li flegis la esperon, ke „ĉe la jaro 2000 jam ĉiuj infanoj, finintaj la bazlernejon, legos flue la muziknotojn."

Lia aŭtoritato estis tre alta, tamen li ne povis ĉiam senĝene ĝui la rezultojn de la granda laboro. Okazis ekzemple, ke ĝuste la Muzika Altlernejo forigis foje la devigan instruadon de la solfeĝado ĉe la estontaj muzikinstruistoj; por denove enigi ĝin en la instruplanon, Kodály ree devis lukti dum jaroj.

Li havis cetere la planon, ke post akiro de la bazaj konoj, oni devas

Seminarianoj el Kenjo kaj Venezuelo

konduki la popolon per la sekva paŝo al la plurvoĉa muziko, kaj tiel malfermi la vojon al la grandaj verkoj de la mondliteraturo.

Grava sukceso estis en 1950 la inaŭguro de la unua muzikfaka bazlernejo en Kecskemét. Post dek jaroj estis jam cento de tiaj lernejoj en la lando, kaj multaj ankaŭ en aliaj landoj. La faklernejo de Kecskemét fariĝis altnivela instituto, kiu akiris internacian reputacion, kaj estas vizitata ĉiujare de centoj el la tuta mondo por alproprigi la modernan metodikon de la muzika instruado.

La ĥor-komponaĵoj de Kodály estas abundaj kaj variaj. Li ofte adaptis ankaŭ psalmojn por la ĥoroj, uzante la t.n. originalajn melodiojn de Ĝenevo. Plej multe li tamen komponis laŭ la popolkantoj, kies gravan parton *li mem kolektis* dum longaj migradoj tra diversaj regionoj de Hungario. El la spertoj de la folklora kolektanto kaj prilaboranto sekvis lia atentigo: „la popolkantoj estas la bazoj por la majstroverkoj, la lernejo de la bongusto."

La studentoj de la Muzika Altlernejo ricevis en 1953 de Kodály tre valorajn konsilojn. Lanĉante antaŭ ili la demandon: kiu estas la bona muzikisto? – li formis la respondon tiel: „tiu, ĉe kiu troviĝas kulturitaj, muziksentaj oreloj, kulturita intelekto, kulturita koro kaj kulturitaj manoj. Ĉiuj kvar devas paralele evolui en konstanta ekvilibro. Se unu el ili mankas aŭ kuras antaŭen, okazas perturboj."

Alvenis la okdeka naskiĝtago de la populara kaj alte respektata majstro (1962). La aro da solenaj koncertoj kaj omaĝoj superis ĉion ĝistiaman. La registaro distingis lin per la plej alta ordeno, la Scienca Akademio honore kunsidis kaj eldonis memorlibron. Ankaŭ liaj komponisto-disĉiploj per omaĝaj komponaĵoj esprimis dankon al la majstro; inter ili multaj mondfamaj nomoj troviĝas, kiuj en diversaj landoj portis plu la torĉon de lia skolo. La Internacia Popolmuzika Konsilio rekonante liajn edukajn rezultojn, proponis al la membroŝtatoj establi similajn muzikfakajn bazlernejojn, laŭ la hungara modelo.

Post kelkaj jaroj Kodály tiel resumis siajn spertojn: „La hungara muzika edukado elektis ĝustan vojon, edukante ne nur muzikistojn, sed ankaŭ publikon. Se oni volas per unu vorto karakterizi la esencon de tiu edukado, ĝi ne povas esti alia ol la *kanto*. Nia mekaniĝinta erao progresas sur tiu vojo, ĉe kies fino oni iĝas maŝino. De tio sole la animo de la kanto povas nin defendi..."

Aparte ekzemplodonaj, ĉar homamaj, sonas la vortoj de Kodály pri sia verkado: „Mi dediĉis multe da tempo komponi por infanoj ĥorkantojn kaj lernejajn kantlibrojn. Mi kredas neniam bedaŭri la tempon tiel foruzitan anstataŭ komponi pli gravajn verkojn. Sed mi certas, ke tiamaniere mi faris por la publiko same utilan laboron kian mi farus komponante simfoniajn verkojn".

En la historio de la muziko jam firme elstaras la duflanka agado–verkado de Zoltán Kodály: edukanta vaste kaj komponanta altvalore, kaj por la popolaj amasoj, kaj por la muzikamanta publiko de la tuta mondo.

István *László*

La reĝo de l'opereto

Se ni parolas pri opereto, plej ofte ni vokas en nian memoron la bonhumurajn aŭstrojn, ja la aŭstra opereto dum la dua duono de la pasinta jarcento fariĝis mondfama. Sufiĉas, se ni mencias la nomojn de J. Strauss, Milöcker, Suppe, L. Fall, Oscar Strauss, Zeller. Ilia muziko donacis multajn agrablajn horojn por ni ĉiuj, dise en la mondo.

Tiel same ni povas rememorigi ankaŭ pri la granduloj de la franca opereto, inter ili eĉ pli grandioze brilas la klasikuloj de la malnova opereto. Ni pensu pri Offenbach, Planquette, Hervé, Lecoq, Audran kaj aliaj.

Post la grandaj sukcesoj de la francaj, aŭstraj operetkomponistoj, kiuj verkis plejparte en la deknaŭa jarcento, komence de la dudeka neatendite aperis du elstaraj steloj ankaŭ el Hungario: Ferenc *Lehár* kaj Imre *Kálmán*. Ili ambaŭ fariĝis konataj en la tuta mondo.

Imre Kálmán naskiĝis ĉe la bordo de la „hungara maro" (Balatono), en la tiama vilaĝo Siófok, en 1882. La novepoka historio de la hungara operetmuziko distingis lin, kaj krome kelkajn el la samaĝaj operet-komponistoj per la etikedo „sciencaj muzikistoj". Nome ili alproprigis la arton de la komponado ne inter la pezaj cirkonstancoj de migrantaj aktoroj kaj tiuj de la ekscitoj dum la ĉefprovoj, sed en la Muzikakademio, edukiĝinte pri harmoniscienco, kontraŭpunkto, instrumentado, kamermuziko kaj estetiko.

Ilia profesoro pri komponado estis la sama Johano *Koessler*, sub kies manoj edukiĝis ankaŭ B. *Bartók*, Z. *Kodály*, E. *Dohnányi* kaj Leo *Weiner*. Tio evidentigas, ke la juna Kálmán ankaŭ alproprigis altnivelan muzikan erudicion. Li virtuoze manipulis la orkestron, perfekte konis la uzadon de la plurvoĉa sceneja muziko kaj kvankam li bone konis la medion de la internacia opereto, tamen li volonte aplikis ankaŭ la hungarecan dancritmikon, hungaran melodi-teksaĵon, kaj per tio li propre kunligis la voĉojn de la tipe hungara muzika popolteatraĵo kun la melodioj de la opereto.

Tiel estas kompreneble, ke la kuniĝo de eksterordinara talento muzika kaj la ĉiuflanke kulturita individuo baldaŭ produktis la mondsukceson de la hungara opereto. Kiel 26 jarulo li debutis per sia unua opereto „Aŭtuna manovro". Unu jaron post la unua prezento la opereto jam aperis pli ol centfoje sur la scenejoj kaj oni prezentis ĝin en Moskvo, Ĝenevo, Berlino, Hamburgo, Lejpcigo, Munkeno, Prago, Londono kaj Novjorko. Kvankam intertempe okazis la unua mondmilito kaj post tio la socioj ĉie apatiiĝis pro la militismo, la apero de „Aŭtuna manovro" ĉie allogis plenplenajn teatrojn kaj rezultis longajn prezentadseriojn.

Sceno el „La ĉardas-reĝino", eble la plej populara opereto de Kálmán. Maldekstre sur la foto staras Hanna Honthy, stelulino de la hungaraj scenejoj dum pluraj jardekoj

Post la galopa sukceso de lia unua opereto sekvis lia dua teatraĵo (1910), sub la titolo „La bona kamarado". La temo de tiu teatraĵo ne estas tiel bonhumura, kiel tiu de la supremenciita „Aŭtuna manovro" kaj ĉar la publiko eksplicite postulis la gajan scenejan agadon, ĉi tiun opereton oni devis tralabori kaj el proza- kaj el muzika vidpunktoj. Post tiu tralaboro fine la sukceso estis plena kaj la teatraĵo rikoltis rekonon kaj en Budapeŝto kaj en Vieno.

Tiutempe la hungara opereto – depost F. Lehár – jam havis famon en Vieno kaj la teatraj fakuloj de Vieno – antaŭ la prezento en la aŭstra ĉefurbo – ĉiam en Budapeŝto sondis la eblecojn, kiuj kaŝiĝas en la prezento de la novaj teatraĵoj. Tiel okazis ankaŭ en la kazo de „La bona kamarado".

La premiero de la opereto „Cigana direktisto" okazis en Vieno (1912) kaj tiun sekvis la hungara prezento en Budapeŝto (1913). La „libret-fabrikantoj" de Vieno elektis tian temon, kiu speciale inspiris la komponiston kaj vere, la rezulto estis, ke pro la grandioza muziko la publiko entuziasmis kaj la aktoroj konkuris, kiu ludu pli ofte la tre populariĝintan ĉefrolon.

En 1914-1915 Kálmán verkis du operetojn. Tiuj estis „La karnavalfeino" kaj „La reĝeto". Oni prezentis ambaŭ en Budapeŝto kaj Vieno, ili havis iom da sukceso, tamen ili atingis nur 75 prezentadojn, kio estis retropaŝo de la pli fruaj pli-ol-centaj serioj. Kaj krome, pri la „mondmerkata" sorto de la opereto decidis ne la Budapeŝta prezento, sed tiu en Vieno.

Printempe de 1914 libretistoj kaj komponisto kune vojaĝis al Marienbad, por en strikta kunlaboro verki la novan Kálmán-opereton, kiu denove atingos mondsukceson. La komponado de

En la Muzeo de Siófok ĵus oni inaŭguris memorĉambron de Kálmán

la opereto – kies titolo komence estis „Vivu la amo" – okazis en neesprimeble deprima atmosfero, ja en la aero jam ŝvebis la obskura fantomo de la mondmilito. Kaj inter tiaj cirkonstancoj komponis Kálmán la novan, la plej popularan opereton, kies titolon la komponisto, libretistoj kaj direktoro baldaŭ modifis kaj la nova titolo fariĝis „La ĉardaŝ-reĝino". La unua prezento de „La ĉardaŝ-reĝino" okazis en Vieno en la Strauss-teatro. Unu jaron poste ankaŭ en Budapeŝto okazis la solena prezento de la plej famiĝinta opereto de Kálmán.

Al la historio de tiu opereto apartenas la interesaĵo, ke de tiam por la verkoj de Kálmán kvazaŭ konkuras la teatraj direktoroj de Budapeŝto kaj Vieno. La Budapeŝtanoj ofendite vidis, ke Vieno ĉiam pli rigardis la komponiston kiel sian propran, per ĉiuj rimedoj ĝi volas akiri la grandsukcesan komponiston, ĉar Vieno ne povas ekzisti sen opereto kaj la opereto ne povas ekzisti sen Kálmán.

Post iom da paŭzo (1920-21) Kálmán anoncas sin per novaj operetoj: „La nederlanda edzineto" kaj „La bajadero". La nova mondsukceso sekvis en 1924: „Grafino Marica". La libreto de tiu opereto jam en 1918 kuŝis en la tirkesto de Kálmán, sed la komponisto havis kelkajn rimarkojn koncerne ĝin. Post pli-malpli da diskutoj la libretistoj pretigis la definitivan libreton, kaj tiel naskiĝis „Grafino Marica", kies agado okazas en hungara medio.

La ceteraj operetoj de Kálmán: „La diabla rajdisto" en 1932, kaj „Imperiestrino Jozefina" en 1937 signifis iomete novan vojon kompare al la antaŭaj, ĉar en ili reviviĝis veraj historiaj personoj.

Geaktoroj Sándor Németh kaj Erzsébet Galambos en „La cirko-princino"

„La violo de Montmartre", „Princino de Chicago" kaj „La cirkoprincino" tiel same atingis la mondfamon, nome ili estis prezentitaj ne nur en Budapeŝto kaj Vieno, sed ankaŭ en aliaj grandurboj de la mondo. Krom la menciitaj operetoj Kálmán verkis ankoraŭ kelkajn muzikajn teatraĵojn, kiuj prezentiĝis en Okcident-Eŭropo, kaj ankaŭ en Ameriko.

Depost la 30-aj jaroj en Germanio oni ne ludis la teatraĵojn de Kálmán. Pro la faŝisma reĝimo en 1938 li kune kun la familio forlasis Vienon kaj vojaĝis al Parizo, poste al Usono. En Ameriko la nomo de Kálmán jam estis bone konata, precipe depost la sukcesoj de „La ĉardaŝreĝino" kaj de tiu de „La cigana direktisto". En 1949 Kálmán revenis en Eŭropon. En Ischl li metis florkronon sur la tombejon de Ferenc Lehár, al kiu lin ligis sincera amikeco.

La lastan opereton de Kálmán, titolitan „Arizona Lady" oni prezentis en Svisio (1954), sed intertempe I. Kálmán mortis neatendite la 30-an de oktobro 1953.

Dum la dekaj jaroj li donis novan elanon al la populareco de opereto. En liaj operetoj la hungara elemento alojiĝis kun la leĝera eleganto de Vieno kaj per tio li verŝis novan vivon en la vienan opereton. Multaj volis lin vicigi al la komponistoj de Vieno. Nome, inter la kritikistoj troviĝis kelkaj, kiuj tute ne rekonis eĉ la ekziston de la hungara opereto, sed ili konsideris ĝin flanka branĉo de la viena opereto.

La vivkariero de Kálmán estas vojo de admirinda talento, kaj ni aldonu: tiu estis ankaŭ la kariero de feliĉa homo. Li estis bonŝanculo, kiu kapablis kapti la sukceson eĉ inter la plej malfacilaj cirkonstancoj. La furiozo de la du mondmilitoj mortkondamnis plurajn instituciojn, personecojn, altajn rangojn, ne indulgis eĉ la malnovajn teatrojn kaj direktorojn – tamen Kálmán eĉ meze de tiu granda ruiniĝo restis mondsukceso. Kial? Ĉar li estis unu el tiuj talentuloj, kiuj ĉiam kapablis resti sur la plej alta nivelo de sia arto. Lia muziko estas centkolora, ĝi eĥas ĉiam la jesadon de la vivo, la bonhumoron, ian triumfan optimismon. Propre tio estas la fonto de lia sukceso. Kaj al lia sukceso apartenas ankaŭ la fakto, ke eĉ ĉe la zenito de siaj internaciaj sukcesoj li konservis ne malmulte el la hungaraj koloroj.

István *László*

Gyula Hernádi

RNA



Gyula Hernádi (1926–) estas hungara novelisto, romanisto kaj dramverkisto, krome scenaristo de pluraj filmoj de la konata reĝisoro Miklós Jancsó. Lia verkarto diferencas de la tradicioj de la hungara prozo per siaj stilo, temoj kaj perceptmaniero de la realo. En siaj filozofie bazitaj verkoj li priskribas ekstremajn figurojn, en ekstremaj situacioj ekstreme agantajn; aŭdace li kunigas elementojn ŝajne neakordigeblajn, ekzemple intelektismon kun aventurromanaj elementoj. Tiun ĉi novelon ni ĉerpas el *Hungara Antologio,* aperonta en 1983 ĉe la Eldonejo Corvina.

Doktoro Kalver, dudek ok jara kemia inĝeniero laboris en Serten, en la fabriko de medikamentoj Terton, kaj produktis pulvorojn kontraŭ tusado.

Liaj ĉefoj kaj kolegoj konis lin homo diligenta kaj celkonscia, sed kun meza talento.

Li estis fraŭlo, vivis en malgranda komforta domo ĉe la urborando, malofte li forvojaĝis el la hejmo, kaj eĉ tiam nur por kelkaj tagoj.

La ŝanĝoj ĉirkaŭ li okazis abrupte.

En la Kemia Bulteno de la Akademio unue aperis nur mallonga publikaĵo sub lia nomo, sed ĝin sekvis ĉiam pli da longaj, gravaj kontribuaĵoj, precipe el la kampo de sen-alaj ligoj.

Lia kariero komete suprenis, kaj post kvin jaroj, pro siaj rezultoriĉaj esploroj koncerne la intensan senobjektan nubiĝon, li ricevis la Nobel-premion de kemio.

Tiam krom Terton jam estis liaj posedaĵoj du aliaj medikamento-fabrikoj kaj tri fabrikoj de kemia sterko.

La scienca publiko notis lin kiel unu el la plej grandaj kemiistoj.

Kiam aperis lia trifolia disertaĵo, faranta revolucion en la plasmofiziko, fizikistoj envie, dolore eksuspiris.

Li ne haltis ĝis la Nobel-premio de fiziko.

Ĉiuj admiris kaj enviis lin.

Post kvin jaroj li ricevis ankaŭ la Nobel-premion de medicino, pro la solvo de la kancer-problemo.

Oni benis lian nomon, en Serten starigis statuon por li, kaj la plej famaj universitatoj de la mondo elektis lin honora doktoro.

Li estis senkrona reĝo de la scienco.

Post kvin jaroj aperis ankaŭ lia unua romano. La libro estis ekscita, interesa, centmiloj legis ĝin.

*

Ĉefinspektoro Kolter, kunlaboranto de la Internacia Polico tenis en la manoj romanon lede binditan, presitan sur delikata papero, la libron de doktoro Kalver. Li legis ĝin la kvinan fojon. Ĝia titolo kvazaŭ lumineskis: RNA.

La romano temis pri juna kemia inĝeniero K..., kiu produktas pulvorojn kontraŭ tusado en medikamento-fabriko de malgranda urbo.

Li estas diligenta, celkonscia.

Li vivas sola ĉe la urborando, legas multe.

En liajn manojn trafas publikaĵo, laŭ kiu la portanto de memoro kaj scio estas ribonukleata acido, akumuliĝinta en la organismo, precipe en la cerbo; se oni injektas tiun materialon en eksperimentan beston, la materialo transdonas al ĝi la memoraron kaj sciaron de la fontobesto.

Dum noktoj K... faras eksperimentojn per bestoj en sia hejma laboratorio.

Li laboras dum duona jaro, poste vojaĝas al la ĉefurbo por du semajnoj.

Post longaj, skrupulaj preparoj li mortigas profesoron Teren, la mondfaman kemiiston. Li detranĉas ties kapon, la ceteran parton de la kadavro enterigas sur malgranda senarbejo de la arbarego, kuŝanta apud la ĉefurbo, la kapon li prilaboras, la ekstraktitan ribonukleatan acidon li injektas en la histaron de la propra cerbo.

Li ekhavas grandegajn ideojn, precipe koncerne la senalajn ligojn, kaj la intensan senobjektan nubiĝon. Li atingas ĉiam pli gravajn rezultojn, kaj ricevas la Nobel-premion de kemio. Armite per la kapabloj de profesoro Teren, li ellaboras specialan kemian metodon por malaperigi homan korpon, per kiu metodo estas senspure malaperigeblaj la homaj ostoj, eĉ la ostocindro.

Profesoron Teren sekvas fizikisto Koll kaj profesoro Holdin. Li mortigas ilin, ekstraktas el iliaj kapoj la ribonukleatan acidon, kaj alproprigas iliajn memoron kaj kreokapablon.

La senkapigitajn kadavrojn li malaperigas senspure sur la senarbejo.

Pro siaj plasmofizikaj esploroj kaj la solvo de la kancerproblemo li ricevas la Nobel-premiojn de fiziko kaj medicino.

Senkrona reĝo de la scienco.

Li ricevas ĉion, kio estas ricevebla, neniu suspektas lin, tamen li komencas timi.

Do li mortigas unu el la plej famaj advokatoj de la mondo, la brazilan doktoron Migelo, kaj per la kutima metodo li transprenas ties scion.

Jam li scias ĉion pri la krimaferoj, procesa proceduro, pri la plej etaj nuancoj de la strategio de defendo.

Li trankviliĝas, vivas feliĉe, edzinigas junan aktorinon, naskiĝas al ili infanoj.

En iu tago li vekiĝas kun stranga, nekonata soifo. Dum semajnoj lin afliktas la senforma, turmenta, streĉa maltrankvilo, ĝis fine li vortigas ĝin por si.

Li sopiras artistan renomon.

Longe li pensadas. Nervoze li marŝadas tien-reen en la ĝardeno de sia apudmara vilao, kaj poste li forvojaĝas.

Li mortigas la Nobel-premiitan verkiston Sorter, kaj, ekstraktinte el lia cerbo la literaturan ribonukleatan acidon, malaperigas lian kadavron sur la senarbejo.

Li komencas verki. Li sentas nerezisteblan premon, kaj li ekverkas romanon, kiu temas pri juna kemia inĝeniero K..., kiu produktas pulvorojn kontraŭ tusado en apoteko de malgranda urbo.

Ĉefinspektoro Kolter ekzamenis eĉ la plej etajn detalojn. La indikoj, troveblaj en la romano, precize kongruis kun la indikoj, cirkonstancoj de kvin nesolvitaj krimaferoj.

Tuj li raportis pri la suspekto al sia ĉefo, sed tiu priridis lin.

Kolter estis persista, li ne cedis: li insistis ĉe siaj ĉefoj, ĝis tiuj konsentis pridemandi profesoron Kalver.

Tiu ofendite, superece ridis, kaj kun klereco karakteriza por la plej famaj juristoj, li malakceptis kaj refetis la akuzojn.

Ĉefinspektoro Kolter forvojaĝis, kaj revenis al la ĉefurbo nur en la tago de la dua pridemandado. Kalver eĉ ne venis al la policejo, li sendis sian advokaton.

Post la pridemandado de atestantoj Kolter prenis el la poŝo maldikan literaturan revuon, kaj laŭtlegis el ĝi novelon. La kriminalteman novelon verkis profesoro Kalver, tuj post la apero de sia romano. En ĝi li priskribis procedon, taŭgan por senspura malaperigo de kadavroj, kaj ankaŭ la inversan metodon, per kiu la malaperigitaj spuroj povas esti rekreeblaj: la detale ellaborita kemia procedo estis tre komplika, en ĝi svarmis komplikaj formuloj, kaj la redaktoro de la revuo aperigis la verkon nur pro konsidero al la aŭtoro.

Oni trairis ĉiujn senarbejojn de la arbarego apud la ĉefurbo. Fine sur malgranda herbejo per la metodo de Kalver oni trovis identigeblajn spurojn.

Kalver estis pendigita.

La sekvan tagon oni trovis lian kadavron senkapigita en la kadavrejo.

Depost tiam oni aparte observas tiujn scienculojn, kiuj atingas signifajn rezultojn en kemio, fiziko kaj medicino, kaj krome eĉ verkas romanojn.

Tradukis: Vilmos Benczik

István Örkény
(1912–1979)

Opinio-sondado

Ankaŭ ĉe ni fondiĝis kaj jam ekfunkciis la unua tutlanda instituto de opinio-sondado.

Ni petas apogan bonvolon de la loĝantaro.

Ni prezentas kiel specimenon nian unuan enketon destinitan pri la demando: kiel oni opinias pri pasinto, nuntempo, futuro de nia patrujo. Por akiri fidindecon en la rezultoj, ni dissendis la jenan enketilon al dumil naŭcent sepdek kvin personoj de diversaj klasoj, rangoj, oficoj kaj religioj:

1. Opinias la aktualan reĝimon
   a/ Bona
   b/ Malbona
   c/ Nek bona, nek malbona, tamen povus esti iomete pli bona
   ĉ/ Sopiras vivi en Vieno.

2. Ĉu sentas la izolecon de homoj de la dudeka jarcento?
   a/ Plene izoleca
   b/ Preskaŭ plene izoleca
   c/ Onidire plene izoleca
   ĉ/ Foje dialogas kun la domzorganto.

3. Kulturaj pretendoj
   a/ Vizitas kinejojn, futmalmatĉojn, drinkejojn
   b/ Foje rigardas tra la fenestro
   c/ Eĉ ne rigardas tra la fenestro
   ĉ/ Malaprobas la ideojn de Maŭ Ze-dong.

4. Havas kian filozofian instruitecon?
   a/ Marksisto
   b/ Kontraŭmarksisto
   c/ Legas nur la krimromanojn de Agatha Christie
   ĉ/ Alkoholisto.

Konkludaj rezultoj:

1. Dum la pasintaj dudek jaroj ĉio estis kiel eble plej bona.

2. Ankaŭ nun ĉio estas bona, nur la veturoj de aŭtobuso numero 19 estas maloftaj.

3. La futuro estos eĉ pli bona, kondiĉe, ke oni plioftigos la veturojn de aŭtobuso numero 19.

(Noto: plioftigos)

El la hungara: Imre *Szabó*

PANORAMO

Jubileanta poeto

La plej elstara figuro de la moderna hungara poezio, Gyula *Illyés* ĵus festis sian okdekan naskiĝtagon. La oficialaj instancoj kaj hungaraj versamantoj vaste honoris okaze de la jubileo la poeton, en kies verkaro plej harmonie kuniĝis popolaj tradicioj kaj moderneco. Gyula Illyés ĉiam donis grandan atenton al komuninteresaj problemoj interalie li partoprenis ankaŭ gazetaran diskuton pri lingvaj problemoj.

Gyula Illyés leganta „Világ és Nyelv", revuon de HEA



Jubilea ĵazkoncerto kun mondsteloj

Antaŭ 25 jaroj fondiĝis la ĵaz-ensemblo Benkó Dixieland Band. La jubilea jaro estis sukcesa por la sep muzikistoj, ĉar ili atingis la plej signifan rezulton de sia kariero: ili gajnis la premion de la publiko en la Festivalo de Sacramento (Usono). Atinginte tian sukceson en la prapatrujo de *dixieland*, ili invitis mondfamajn stelojn por kunkoncerti en ilia jubilea vespero en Budapeŝto.

La koncerto en la Sporthalo Budapeŝto estis vera festo por la ŝatantoj de la tradicia ĵazo. Kune kun la membroj de la ensemblo rolis ankaŭ Buddy Tate, Joe Newman kaj Al Grey el Usono.

Kiu kaptos la vulpo-voston?

De kelkaj jaroj estas organizataj ĉasrajdadoj en la romantika apud-balatona ĉirkaŭaĵo de Sümeg. La ludan konkuron volonte partoprenas ankaŭ eksterlandaj rajdantoj. En la programo oni revivigas la stilon de iamaj ĉasrajdadoj kun ĉashundoj. En la ludo oni fiksas sur la ŝultron de unu el la konkurantoj vulpo-voston kaj la pelantoj tion devas akiri.

Unuafoje en la ĉi-aŭtuna sezono la membroj de rajdoklubo de Vieno konkuris por la titolo de la plej bona rajdanto.

PANORAMO

Parada TV-programo

La okcidentgermana ZDF kaj la Hungara Televido aranĝis komunan festan programon en Budapeŝto kun la titolo: René Kollo kaj liaj gastoj. Mondfamaj steloj rolis en la programo, inter aliaj ankaŭ Gina Lollobrigida. La Hungara Televido rekte prezentis la programon la 17-an de oktobro kaj ZDF prezentos ĝin en sia ĉefprogramo Kristnaske.

Garibaldi-memoraĵoj en Hungario

Antaŭ 175 jaroj naskiĝis kaj antaŭ 100 jaroj mortis Garibaldi, gvidanto de la Itala Demokrata Movado. Honore al lia memoro florkronada solenaĵo estis aranĝita la 19-an de oktobro antaŭ lia busto en la ĝardeno de la Hungara Nacia Muzeo. En la solenaĵo partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la Itala Ambasado en Budapeŝto.

En la Muzeo pri Milithistorio la saman tagon oni inaŭguris ekspozicion kun la titolo „Memoraĵoj pri Garibaldi en Hungario." Multaj interesaj samtempaj dokumentoj, memoraĵoj prezentas la kontakton inter Garibaldi kaj la hungaraj elmigrintoj post la malvenko de la hungara liberbatalo en 1849.

Okaze de la solena malfermo parolis Béla Köpeczi, hungara ministro pri klerigo, Alessandro Cortese de Bosis, Budapeŝta ambasadoro de la Itala Respubliko, Raffaele Costa, itala ŝtatsekretario pri eksteraj aferoj kaj Domonkos Kosáry, hungara akademiano.

Partoprenis la malferman solenaĵon ankaŭ Anita Garibaldi, pranepino de la granda itala liberbatalanto.

Sur la foto: Raffaele Costa, Béla Köpeczi kaj Anita Garibaldi



La variebla instalaĵo el tuboj estas uzebla por instali magazenojn kaj vendejojn de industriaj varoj.

Ĝiaj varieblaj dimensioj ebligas uzi ĝin por ejoj de ajna grandeco.

La suplementaj instalaĵoj – stabloj por konfekciaĵoj, vendotabloj – agrabligas aĉetadon kaj vendadon.

Ĉefaj karakterizoj:

- Multe ŝarĝebla
- Ebloj de variado
- Estetikaj konturoj



KERIPAR

„KERIPAR" Entrepreno Produktanta Maŝinojn kaj Instalaĵojn por Komerco

Budapest VI. Népköztársaság u. 43.

Telefono: 313–124 Telekso: 226237

REVUO DE REVUOJ

Proksimiĝas nia jubileo centjara – neniel estas do mirinde, ke oftiĝas jubileoj ene de nia movado. Lastnumere mi skribis – instigite de INTERNACIISTO – pri la esperiga fondo de IPE (Int. Proleta E-istaro) antaŭ 50 jaroj. Kaj jen, post brave regulaj aperoj dum 25 jaroj, eblas legi la 100-an numeron de INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO – kiel ĉiam, kun riĉa enhavo pri lingvopolitikaj kaj movadpolitikaj aferoj. La redaktoro, d-ro Artur *Bormann,* kiu en Antverpeno estis elektita honora membro de UEA, konstante kaj senhezite luktas tra la cento da kajeroj kun la celo igi pli klara la taskojn de la movado, la vojon al la „plena venko", kiu bezonas multe da etaj paŝoj – kaj sobran konscion ! La ĉiam seriozaj artikoloj klopodis malnebuligi certajn fenomenojn, objektive analizi la vivgravajn problemojn ĉirkaŭ IL, kaj per solidaj argumentoj rifuzi eksterajn kaj internajn erarojn aŭ atakojn. Respektplenan prestiĝon akiris liaj rekonsciigaj rimarkoj; tiuj estas aparte necesaj en la movado, kie – plej nature – abunde oni inklinas jen al memfortiga troigemo, jen al konvinkon perda rezignemo. Nia bondeziro okaze de la jubileo: pli kaj pli vasta aktiva publiko legu kaj lernu el IIS!

Maljubileo ŝajnas plezurinda afero, se ĝi okazas kiel ĉe LA DUA BUSO, kiu ĵus *ekveturis* por anstataŭigi L' omnibuson. *Miyamoto* kaj liaj amikoj – feliĉe – stiras denove la etformatan literatur-buson, kies pasaĝeroj estas originalaj kaj tradukitaj japanaj noveloj kun ĉarmaj poem-partnerinoj. La nova elano espereble daŭros pli longe, ol la (in)aŭgurita periodo de nur du jaroj (!), apenaŭ kredeble post la komencaj du numeroj. La disputo pri traduk-maniero de japanaj poemoj – inter *Izumi* kaj Miyamoto – estas interesa precipe por delikatuloj, sed la temo mem turnas min al alia insula lando: BRITA ESPERANTISTO (847-848.) prezentis eseon pri traduk-arto, fare de William *Auld.* Kvankam jam prezentis sin kelkaj disputantoj, esence oni devas konsenti pri lia aserto, ke tiu arto viciĝas inter la *plej malfacilaj,* ja la tradukisto devas kvazaŭ danci en kaĝo kun katenitaj piedoj-manoj... Sed pri ĉio-ĉi mi aliloke kaj alifoje volas trakti pli detale. Nun ni kontentiĝos per la tre sprita tradukaĵo – inter multaj aliaj, por ekzemplo ŝutitaj de Auld – de la fama itala vortŝerca eldiro (tradukisto – perfidulo), jen: „traduko – trukado". Prave, ja plej ofte nur per majstra artifiko atingeblas la artefiko...

Certe ankaŭ en la nuntempa monda ekonomia situacio necesas multloke (aŭ ĉie?) iom da artifiko. Precipe tial prezentas interesegan legaĵon aŭ studindaĵon EKONOMIA BULTENO PRI USONO, kie prof. Th. A. *Goldman* donas profunde detalan skizon pri la dinamismoj kaj karakterizoj de la ekonomia situacio, ankaŭ lige kun la registara politiko. Precizaj statistikaj indikoj kaj sciencaj klarigoj kompletigas la *altan fakan nivelon* reprezentantan – verdire unikan – bultenon. Ĝi povas taŭge servi ankaŭ por naciaj ĵurnaloj per interpretado de lertaj propagandistoj!

Alispeca certe, tamen iagrade ankaŭ faka bulteno estas la (preskaŭ luksa) belaspekta ESPERANTISTA VEGETARANO, redaktita en Slovakio. La ĉerizon enbuŝiganta ĉarma knabo sur la kovrilbildo preskaŭ igis min kuirejen kuri, por preni same iun bongustan frukton... Sed mi restis, ĉar pri la „apoteko" de la naturo, kaj pri natura vivmaniero troviĝis kontentige precizaj artikoloj, etaj studoj. Ankaŭ „naturistaj paĝoj" proponas sin kun observindaj artikoloj.

Nia elpaŝo el la propra medio al la „cetera" mondo pli kaj pli realiĝas, kaj tio estas senkondiĉe salutinda. Feliĉe, en la sekvaj okazoj tio ŝajnas altnivele farita, kaj tio eventuale havos sian sukceson. Ne rekte, tio ne estus atendebla: personaj opinioj ne kutimas ŝanĝiĝi per unu frapo, sed „eĉ guto malgranda, konstante frapante..." LA ESPERO (4.) dediĉis svedlingvan numeron al la rilatoj de turismo kaj Eo, kun profesinivelaj, ne longaj artikoloj kaj kun bonaj fotoj.

La Eŭropa okcidento, la landoj de la „Komuna merkato" havas ankaŭ sian lingvan problemon, kiu tendencas al maljusta traktado de la ne grandaj popoloj – skribas L' ESPERANTO (3.), ankaŭ en plene *itallingva* numero, dediĉita al la menciita problemo. „Se la uzataj lingvoj reduktiĝos al la angla, tiam, almenaŭ laŭ la kultura nivelo, Eŭropo iĝos la „korteto" de Usono, kion neniu el inter la „eŭropistoj" deziras" – por iom citi el la avertoj de la multflanka argumentado. Eminentaj artikoloj traktas tiun lingvopolitike gravegan temaron. Andrea *Chiti-Batelli,* ne-esperantista batalanto de la Eŭropismo, verkis kun titolo „Unu lingvon por Eŭropo", kaj honeste finas la ampleksan studon pri la favoraj kaj kontraŭaj opinioj koncerne la solvon, ke oni devos establi sciencan eksperimenton pri uzebleco de Eo. Do neglekti kaj forlasi la „prijuĝadon kaj rifuzon de IL sen ia kono pri ĝi." Lingvistika analizo aperas en la dua: „Eo: lingvo kiu funkcias" de Alessandro *Bausani,* profesoro ĉe la Universitato de Romo, kiu respondas la kritikojn flanke de intelektuloj kaj lingvistoj koncerne tiun – nekredeblan – fenomenon.

THE WORKER ESPERANTIST (Laborista E-isto) esprimas (okt.) averton, ke Britio, kune kun la Okcident-Eŭropaj landoj de NATO, riskas esti batalkampo, atombombita de ambaŭ flankoj, pro la Jankia senindulga militemo. Dum la „Thatcher-fiasko" ĉe Falklando/Malvinoj, preter la mortintaj soldatoj la britaj bankoj trankvile negocis kun Argentino – internacia kapitalismo minacas ĉion superregi, la laborista klaso devas do kontraŭstari, skribas la gazeto.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

Agrikultura progreso pere de akvomastrumo

En la tuta mondo pliiĝas la bezono por vastigi la agrikulturon, kreskigi ties produktadon. Tio rilatas kompreneble ankaŭ al la disvolvo de la nutraĵindustrio. Ekonomikistoj ĉie serĉas la vojojn por solvi tiun preman problemaron, kiu diversas laŭ landoj, tamen ankaŭ similas en multaj rilatoj.

La geografio de Hungario prezentas vastajn eblojn por evoluigi la agrikulturon. Tiucele estas nepre bezonataj industriaj metodoj de amasproduktado kaj modernaj teknologiaj sistemoj kune aplikendaj. Ja nur tiamaniere estas realigeblaj la sciencaj, praktike aplikeblaj metodoj, do nur en kadro de amasa, industrieca produktado sur grandbienoj. Al la moderna produktado tutmonde kontribuas ankaŭ maŝinoj, sterkaĵoj, kemiaj sarkiloj kaj altkvalitaj semoj. Al tiuj aliĝas la agrikultura akvomastrumo per multflankaj agadoj: irigacio, grundoprotektado, akvorezervado, diversaj regul-

Bonstata forkonduka kanalo

igoj kaj utiligoj de la akvoj zorgas pri la necesa akvohavo de la grundo. Sen ĝi la vegetaĵo ne povas ekzisti, fiaskas la produktado. Sed okazas tiel ankaŭ ĉe tro da akvo, kio ofte kaŭzas damaĝojn. Ĝuste mastrumi per la akvo, estas aparte grava por la produktado, precipe en Hungarlando, kie nur modesta kvanto da akvo venas desupre per pluvo, neĝo kaj alispeca *precipitaĵo*.

Tiun malfavoran cirkonstancon eĉ pli ĝenas, ke la malmulta precipitaĵo (5-600 mm en jaro) laŭtempe malegale venas: plejparte aŭtune kaj vintre, do ĝenerale ne dum la agrikulture gravaj sezonoj. Se falas tro da precipitaĵo, inundoj minacas grandajn regionojn, dum aliloke, sur la Granda Ebenaĵo, precipitaĵo apenaŭ sufiĉas por bona rikolto. Samtempa manko kaj abundo da akvo kaŭzas ofte grandajn damaĝojn en la agrikulturo. Tio estas ripetiĝanta fenomeno en Hungario.

La surgrundaj akvoj inundis dum multaj jaroj eĉ 270 mil hektarojn, tiel kaŭzante grandegajn perdojn. Tromalsekaj paŝtejoj, inundoj de riveretoj nereguligitaj kaj de ili fortrenitaj grundoj plue damaĝas la agrikulturon. Sur la tromalsekaj paŝtejoj are mortas bestoj pro enhepataj parazitoj (fascioloj), malpliiĝas la viando- kaj laktoprodukto – levante la akvodamaĝojn ĝis 5-6 mil forintoj (ĉ. 150 dolaroj) laŭhektare. Kvankam la akvoforigo ĉe paŝtejoj kostas por hektaro ĉ. 35 mil Ft, la investo por akvoforigo amortizas dum 6-7 jaroj. Kaj en Hungario troviĝas centmiloj da hektaroj de tiaj tro humidaj paŝtejoj kaj herbejoj, kiuj produktus post sistema akvoforigo duoblon da fojno ol nun...

Pluviga irigacio

Irigacia rezervujo



Manke de pluaj ekkultiveblaj kampoj, la agrikulturo devas produkti pli da vegetaĵoj sur la sama areo. Ties grava rimedo estas la irigacio, por kiu la akvomastrumo devas disponigi akvon, certe ne „superflue", tamen laŭ racie kalkulita bezono. Racie mastrumi, ankaŭ ekonomie, pri la precipitaĵo kaj pri la disponebla akvohavaĵo, estas do unuaranga tasko de la akvomastrumo. Moderna agrotekniko, laŭbezone sulkoj kaj remparoj estas uzendaj retenante la akvokvanton, kiu necesas por taŭga grunda humideco. Tion aliflanke determinas la laŭtempa bezono de la produktado, ja tio alternas ne nur ĉe la diversaj vegetaĵoj, sed ankaŭ en la stadioj de ilia kreskado kaj maturiĝo.

La surgrundajn akvojn oni devas same reteni en rezervujoj helpe de kluzoj, establitaj en la defluigaj kanaloj. Ili estas senpere utiligeblaj ankaŭ por irigacio kaj fiŝlagoj. Koncerne la defluigon de la novaj stagnantaj akvoj, estas menciinde, ke pro la iama postrestinteco de la hungara agrokulturo tio daŭris tro longe, pli ol 40 tagojn. Post la liberiĝo de la lando per modernigo oni atingis, ke la defluigo averaĝe daŭras jam nur 20 tagojn. Eĉ tio ne estas ankoraŭ kontentiga, ĉar la mo-

derna amasprodukta agrikulturo postulas malpli ol 14-tagan defluigon, sed oni atingos certe ankaŭ tion.

Pro la menciita manko de pluaj ekkultiveblaj kampoj, kiel reala eblo de la lando por ampleksigi la agrikulturan produktadon, restis sole la grandskala kreado de modernaj socialismaj grandbienoj. Vere revolucia transformo okazis en la agrikulturo dum disvolviĝis la potenca movado de la agro-kooperativoj. Tiun procezon ankaŭ la akvomastrumaj servoj forte apogis, kaj grave kontribuis al la rapida fortikigo de la agro-kooperativoj. Ties produktado kaj enspezo, ankaŭ laŭ membroj, kalkulante, multe superas tiujn de la iamaj kamparanoj. Tiu apogo de la akvomastrumo daŭras senĉese: oni aparte disvolvas la hidrologiajn servojn kiuj ligiĝas al la agrikultura prospero.

La reguligo de la surgrundaj kaj stagnantaj akvoj, la drenado de la vastaj, trohumidaj, eĉ marĉiĝantaj kampoj, paŝtejoj kaj torfejoj, ebligas tiujn rekultivi. Tiamaniere oni povas racie mastrumi pri la precipitaĵoj, kaj laŭbezone eblas rapide defluigi desur la kampoj la akvojn malhelpantajn la kultivadon, kiuj alie misformus la grundan strukturon.

Dum la lastaj jardekoj dekobliĝis la irigaciataj areoj, dank' al la akvomastrumo. La plej elstaraj establaĵoj estas ĉe la rivero Tiso la ŝveligaj digoj ĉe *Tiszalök*, la akvonodo ĉe *Kisköre*, kaj la Orienta Ĉefkanalo, kiu krom ampleksa irigaciado ebligas ankaŭ centkilometran ŝipvojon. Mem la irigacio estas grava rimedo por grandaj produktoj: la rikolto kreskis pro la irigacio 50-100 procentojn, la tiucelaj investoj dum 10 jaroj plene amortizis.

La surfaco de la fiŝlagoj duobliĝis, la fiŝprodukto triobliĝis kompare al la antaŭmilitaj jaroj. La fiŝeksporto montriĝis tre rentodona, do indas disvolvi la fiŝlagojn, kiuj altgrade utiligas tiajn areojn, kiuj maltaŭgas por alia kulturado.

Videble, la akvomastrumo multmaniere kapablas kontribui al la disvolvo kaj prospero de la moderna, granddimensia agrikultura mastrumado.

La nuna aspekto de la hungara agrikulturo

Por skize trarigardi la nunan agrikulturon en Hungario, indas komence mencii, ke la iam tre laborintensa, teknikajn ilojn malmulte uzanta agrokulturo dum nur kelkaj jardekoj transformiĝis al grandkapabla, potencajn aparatojn uzanta labormalintensa produktado. Iĝis reganta la grandbiena amasproduktado, forte koncentriĝis la produktofortoj kaj tiel eblus ilin pli efike utiligi. La industria karaktero de la tiel transformiĝanta agrikulturo fontas el tri gravegaj faktoroj, laŭ la sekvaj.

1./ La agrikultura produktado estas jam plene mekanizita kaj kun la kompleksaj maŝino-grupoj ĝi jam alvenas ankaŭ al iugrada aŭtomatizado, Tiuj iloj postulas severan vicordon de la laboroj, preskribante ne nur ties kvantojn, sed ankaŭ certajn kvalitojn kaj manierojn por la bienoj. Krome prezentas sin la kemiizado, la amasa uzo de kemiaj produktaĵoj por vegetaĵoj kaj bestoj, kaj tial pli kreskas la produktiveco. Por la produktado estas ege grava la sterkado per kemiaĵoj. La interrilato de la uzita sterko-kvanto kaj la rikoltita kvanto estas jam pruvita. La uzo de la sterkaĵoj, kune kun aliaj metodoj de la industrieca pro-

Gaja rikolto en irigaciita fruktarbaro

duktado, ne nur pli sekurigas kultivadon, sed ankaŭ nepre necesas por ekspluati la genetikajn eblojn.

Apud la mekanizado kaj kemiizado tre gravas por la intensigo de la agrikulturo ankaŭ la selektado. Oni anstataŭas la malnovajn specojn per pli produktivaj novaj. La genetiko kaj ĝia realigo faris revolucian ŝanĝon en la nutraĵproduktado. Kreiĝis teknologioj por plibonigi la specojn kaj tiaj procesoj, kiuj ebligas krei ankoraŭ ne ekzistintajn specojn, pli adaptitajn al la bezonataj ecoj. Tiuj estas ankaŭ amase, per industriaj metodoj kultiveblaj. La mikrobiologio – precipe per genmanipulado – multe helpas produkti pli da albuminoj tre necesaj en la nutrado. Malfermiĝas vasta horizonto antaŭ la pliproduktivigo de la grundo, eventuale por faciligi la prilaboron de la grundoj.

Anasbredado bezonas ankaŭ akvon

2./ Pro la amasproduktado pligraviĝas la postuloj koncerne la unuecon de la produktitaj kvalitoj kaj ties konsistoj. Aliflanke tio bezonas pli taŭgan organizadon kaj ĝeneralan modernigon. Plivastiĝas la industriecaj produkto-sistemoj, kiuj akordigas la faktorojn de la produktiveco, la teknikajn, biologiajn, kemiajn kaj homajn faktorojn. Tiamaniere eblas adapti la plej modernajn rimedojn komplekse (grandkapablajn specojn, maŝinojn, plantoprotektajn kemiaĵojn, furaĝon ktp.). Okazas severa determinado en la teknologia ĉeno, sekve strikta enprogramigo, ĉar ĉiu el la farendoj kaj faktoroj estas egale grava: se iu el ili ne ĝustagrade plenumiĝas, la tuto de la produktado estas minacata. Devas do regi disciplino, kaj tio postulas ankaŭ pli da konoj ĉe la laboruloj.

La industrieca produktado necesigas kaj specialigon, kaj koncentradon de la agrikulturaj entreprenoj. La optimuma funkciigo de la maŝinaro eblas nur sur certa area grandeco. Ankaŭ la bredejoj havas certajn ekonomiajn limojn.

La amasa varproduktado bezonas akordigon de la produktado, staplado (kolektigo) kaj prilaborado. En tiu kadro plimultiĝas la vertikalaj ligoj interne de la entreprenoj, ekzemple inter la bestobredado kaj furaĝproduktado. Pli integriĝas la sinsekvaj fazoj de la varoproduktado, precipe ĉe la nutraĵoj: ilia produktado, prilaborado kaj vendado estas unuece direktata.

La disvastiĝo de la industriecaj produktosistemoj ofte kreas novtipan labordividon inter la agrikulturaj entreprenoj. Multe da grandaj entreprenoj ankoraŭ ne kapablas establi tiaspecan sistemon. Pro tio en la centro de la produktosistemo troviĝas tia agrikultura entrepreno, kiu jam kapablis krei industriecan teknologion por iu produktaĵo. Kompreneble ĉiu ajn entrepreno povus prilabori tiun teknologion, sed por establi tian produktad-sistemon necesas antaŭa ŝtata aprobo. Monopoloj do ne povas elstari, sekve pluraj entreprenoj povas – konkurante – organizi produktad-sistemon de la sama varo. Tiu konkurado havis kaj certe ankaŭ havos en Hungario tre grandan rolon en la disvastigo de la modernaj produktaj sistemoj. La partoprenantaj entreprenoj povas libere taksi la diversajn kondiĉojn, resp. proponojn de la establiĝantaj sistemoj, kaj laŭ tio decidi pri sia aliĝo. Tio ebligas al la agrikulturaj entreprenoj libere ĝui la avantaĝojn de la koncentrigo, speciaiĝo, organizado kaj modernaj metodoj. La centro de la sistemo multe helpas al la membro-entreprenoj por organizi la produktadon, kaj la prilaboritan industriecan teknologion adaptas al la cirkonstancoj ekzistantaj ĉe la membroj – kompreneble ĝi ankaŭ kontrolas, ke oni ĝuste plenumu la preskribitan teknologion.

3./ La industriiĝantan agrikulturon karakterizas ankaŭ la tendenco al integriĝo, t.e. al novtipaj formoj por kunlaboro kaj kooperado de la entreprenoj. Ties radikoj troveblas en la ŝanĝoj de la konsumaj bezonoj, kiuj prefere postulas prilaboritajn nutraĵojn. Pli kaj pli granda iĝas tiu parto de la agrikulturaj produktaĵoj, kiu estas preparata pere de la nutraĵindustrio, almenaŭ iel manipulita ĝi estas aĉetata fare de la konsumantoj.

La tradicia agrikulturo tiamaniere pli kaj pli iĝas kvazaŭ centro de la multfaza nutraĵproduktado, al kiu ĝi liveras la materialon. El „sendependa" ekonomia branĉo la agrikulturo kvazaŭ transformiĝas je materialon produktanta subbranĉo de la nutraĵindustrio! Tiu procezo forte stimulas formi ĝin industrieca, kaj la produktadon ekonomie koncentri, eĉ kooperadi. La teknologiaj interrilatoj de la

Establo de nova akvoturo por la vilaĝo

opaj stadioj ene de la nutraĵproduktado faras eĉ necesa la interordigon de la produktadaj ĉeneroj. Jen la klarigo, kial estas la agrara-industria integriĝo jam tutmonda kaj ĝenerala fenomeno.

Estas vere interese rigardi, kiel integriĝas la iam dividita vertikala ekonomia ĉeno de diversaj produktadoj al vera agrar-industria komplekso. La rentablitato kaj la konkur-kapablo multe kreskas – ankaŭ pro la tiel plibonigebla varo-kvalito – se la tuton de produktad-ĉeno oni direktas kvazaŭ unu ekonomian komplekson, laŭ la kunaj interesoj. La grandaj agrikulturaj kaj industriaj entreprenoj formas por tiu tendenco konvenan bazon, kaj firmigas ĝin la rezultoj de la scienca-teknika revolucio.

Nuntempe estas la tekniko (inkludante ankaŭ la bioteknikon) kies saltmaniera progreso multrilate transformas la entreprenojn, precipe ilian organizon. Sekve de la kompleksa mekanizado transformiĝas la teknologio kaj strukturo de la produktado; pro tio malaperas tradiciaj labororganizaĵoj, aliloke malpliiĝas la personaro ĉe certaj funkcioj. La manlaboro devas adaptiĝi al la novtipa mekanizado, kiu determinas la manieron de la farendoj, kaj trudas sin kaj siajn principojn al la tuta organizado.

La kompleksa vegetaĵproduktado alportas egajn ŝanĝojn, sed ties antaŭkondiĉo estas la specialigo de la produktado, kaj la malpliigo de la kultivitaj specoj. Tio ebligas pliampleksigi la plantejon de la opaj specoj, sekve la ekonomian funkciigon de la kompleksaj maŝinaroj, forigante eĉ la reston de la manlaboro. Aliflanke, la kulturado de la vegetaĵoj, pro la forta mekanizado iĝas kvazaŭ afero de taŭga entreprena direktado de la maŝinaro; tio evidente faras siajn efikojn al la strukturo de la entrepreno, kiu neeviteble laŭgrade transformiĝas.

La teknika progreso kaŭzis similajn ŝanĝojn ankaŭ en la bestobredado, kaj modifis la organizon. La jam regantaj specialigitaj bredejoj kunportis gravajn ŝanĝojn en la entreprena organizo. Malpliiĝas la personaro de la bredado, malmultiĝas la bestospecoj en la sama bredejo, kaj la novaj teknikaj rimedoj postulas pli da fakscio, eĉ alispecan laboron de la laboruloj.

Konsiderante la bazajn faktorojn de la produktado ĝenerale, por la ekonomie optimuma utiligo montriĝas nepra kondiĉo la *taŭga harmonio rilate*

– la ekspluaton de la tero kaj de la organismoj (plantoj kaj bestoj),

– la tiucelajn produktilojn kaj teknologiajn metodojn,

– la necesan personaron kaj ties nivelon (kulturo, fakscio k.s.).

En la agrikulturo certe la plej grava estas la produktivo de la tero. Tio postulas adapti ĉiujn aliajn faktorojn por la plia produktivo de la tero. Samtempe necesas konvenaj biologiaj faktoroj, kiuj – kiel ankaŭ la tero – nuntempe jam ne estas rigidaj donitaĵoj de la naturo, ĉar eblas ilin modifi per homa, fakscia laboro kaj investoj. La pliboniga selekto de specoj estas nepra bezono por la pli efika mastrumado.



Starigo de akvoturo

Kontribuo al la prospero de la vilaĝoj

La Hungarlandaj vilaĝoj en la pasinta jarcento, eĉ en la unua duono de la nuna jarcento, ĝenerale montris tre bedaŭrindan aspekton. En la ofte troveblaj aĉaj dometoj loĝis tro grandaj familioj, kies cirkonstancoj malebligis la veran higienon. La fositaj kaj netegitaj putoj tre ofte donis infektitan akvon por grandaj amasoj: pli ol la duono de la loĝantaro vivis inter tiaj cirkonstancoj en la vilaĝoj, kaj plejparte vivis pere de la agrikulturo.

Post la dua mondmilito la granda socia revolucio inaŭguris novan eraon ankaŭ koncerne la akvoprovizon de la lando. Riparinte la egajn militajn damaĝojn, ekde 1950 komenciĝis elana progreso kaj en la urba akvoprovizo, kaj en la vilaĝoj. Interalie oni ekuzis „nanajn" akvoprovizilojn: la abundan akvon de la bonaj putoj – anstataŭ senbezone forfluigi – oni kondukis per tuboj al pli da konsumantoj, laŭ la produkteblo de la puto. Tial multe malpli da putoj estis faritaj; la metodo montriĝis pli malkara, ankaŭ la prizorgado, por ne mencii la ege gravan: la protekton de la akvohavaĵo!

Dume venis la socialisma industriigo, la tion sekvinta vasta urbanizado, kaj poste la socialisma transformo de la agrikulturo, kiu donis novan elanon ankaŭ al la vilaĝa akvoprovizado. Tiu ĉi ekde 1965 denove akceliĝis, ankaŭ helpe de la akvoprovizo-kompanioj.

En la vilaĝoj oni nove konstruis 40 procentojn de la loĝdomoj, ankaŭ la aliaj estis renovigitaj. Ĉirkaŭ 1300 vilaĝoj havas jam modernan, publikan akvoprovizadon, en 150 funkcias ankaŭ kanalizacio. Plejparte pro tiuj publikaj hidrologiaj verkoj grave transformiĝis la vilaĝa vivmaniero al la urba, ja pli ol duono de la vilaĝa loĝantaro ĝuas jam publikan akvoprovizon.

Efektive la progreso de la vilaĝoj – laŭ la ekonomio kaj publikaj servoj – atingis jam tian gradon, ke la jarcenta postrestinteco estas plejparte superita. La aspekto de la Hungarlandaj vilaĝoj jam neniel estas komparebla al tiu antaŭ 30-40 jaroj, al la definitive forpasintaj iamaj cirkonstancoj. La vivmaniero de la vilaĝa loĝantaro tute transformiĝis pro la menciitaj progresoj, kaj al tio grave kontribuis la donacoj de la akvo.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Maŝinejo de vilaĝa akvoprovizejo



Libroj el Budapeŝto

Ne la unuan fojon sur la paĝoj de tiu ĉi revuo ni skribas pri la libroeldona agado de Hungara Esperanto-Asocio. Dum la lastaj jaroj HEA fariĝis unu el la plej viglaj Esperantaj eldonejoj: pluraj dekoj da Hungarlande eldonitaj Esperantaj libroj troviĝas sur la librobretoj de legantoj kaj libroservoj en ĉ. 150 000 ekzempleroj (tiu cifero ne inkluzivas nacilingvajn lernilojn kaj informajn eldonaĵojn).

En la ĉijara eldona laboro montriĝis certa nereguleco: la plimulto de la libroj aperis dum la lastaj monatoj de la jaro. Tamen, la produkto estas atentinda, ĉefe sur la kampo de la originala beletro. Aperis la longe promesita originala novelaro *Lappar, la Antikristo* de Endre *Tóth* (1931–1981), kiun la kritiko akceptis unuanime laŭde. Tre kompetenta konanto de la Esperanta kulturo, poeto Baldur *Ragnarsson* eĉ skribis, ke la titoldona novelo estas unu el la plej bonaj, iam verkitaj en Esperanto. Trovis plaĉon ĉe la legantoj ankaŭ la sinsekve aperintaj libroj de István *Nemere:* la originala novelaro *La naŭa kanalo* kaj la sciencfikcia romano *La fermita urbo.* Lia dua originala romano – kiu povus esti nomebla politika-morala fikcio kun aventurromana garnaĵo – aperos post nur kelkaj semajnoj. Kaj dume li jam transdonis al la eldonejo ankaŭ sian trian romanon. Ĝia titolo estas *Sur roko granita,* kaj eliros dum la printempo.

Ĵus aperis ankaŭ la originala poemaro de Adalberto *Huleŝ* sub titolo *Katoj kaj ĉevaloj.* Lia profunde intelekta kaj kuraĝe eksperimenta poezio verŝajne havos indan akcepton ĉe la versamantoj. Cetere, ĉiuj tri aŭtoroj – *Nemere, Tóth* kaj *Huleŝ* – estas bone konataj de la legantoj de Hungara Vivo, ja ili estas konstantaj kunlaborantoj de nia revuo.

HEA eldonis ankaŭ novelaron de la tre renoma Esperanta prozisto *Lorjak.* La titolo de la libro estas *Iluzioj,* kaj ĝia specifaĵo estas, ke du noveloj aperas ankaŭ en franca, kaj unu en angla traduko. Tio verŝajne havos ioman propagandan efikon en franclingvaj kaj anglalingvaj landoj.

Transirante de beletraj verkoj al lerniloj, ni menciu duan eldonon de *Baza Literatura Krestomatio:* ĝi estis ampleksigita per novaj verkoj kaj bio-bibliografiaj resumoj pri ĉiuj aŭtoroj, rolantaj en ĝi. Tiu ĉi verko donas specimenojn el la Esperanta literaturo de la komenco ĝis 1980.

Estas sur la limoj de beletro kaj lerniloj la facila romaneto de Julio *Baghy: La Verda Koro.* Ĝi aperis kun gramatikaj suplementoj: unu estas en Esperanto, la alia en la hungara lingvo. Tiamaniere oni povos facile utiligi ĝin en progresigaj (kaj eventuale ankaŭ elementaj) kursoj kie ajn. Tiu ĉi libro jam de pluraj jaroj mankas el la internacia merkato – kiu do deziras havi, tuj mendu ĝin, ĉar estas verŝajne, ke baldaŭ ĝi elĉerpiĝos.

Estas destinitaj por komencantoj ankaŭ du aliaj libroj: *La aventuroj de Huckleberry Finn* de Mark *Twain* kaj *La rozo de l' sultano* de Gyula *Krúdy.* La unua estas bildrakonta adaptaĵo de la usona klasika junulara romano, kaj la libro havas la samajn aspekton, dimensiojn, prezon ktp. kiel la pli fruaj bildrakontoj, eldonitaj de HEA: *La filoj de l' ŝtonkora homo, Steloj de Eger, La Faraono, La aventuroj de Tom Sawyer.* Pri malnova epoko rakontas *La rozo de l' sultano,* kaj la rakonton akompanas belaj dukoloraj ilustraĵoj sur ĉiu paĝo.

HEA eldonis du librojn en kunlaboro kun Esperanto-Centro Paderborn. La unua estas *Kibernetiko de la homa lingvo,* kolekto da studoj redaktita de profesoro Helmar *Frank.* Ĝi estas altnivela faklibro, tamen bone komprenebla por ĉiuj homoj kun mezaj konoj pri lingvistiko. La alia komuna eldonaĵo estas *Metodiko en la praktiko,* artikolaro redaktita de Zsuzsa *Barcsay.* Tiu ĉi libro ŝtopas breĉon, ja ni havas jam ne malmultajn librojn pri la teorio de metodiko, sed tre malmultajn, kiujn povas utiligi ankaŭ personoj sen inklinoj al teoriumado.

Dum la sekva jaro HEA deziras konservi la lastatempan viglecon de la eldona agado. Tamen, tio povos sukcesi nur se la publiko vaste aĉetos la supre vicigitajn verkojn, ja nur vigla aĉetado povas certigi viglan eldonadon.

Intervjuo kun Lorjak

Kulinaraj instrumentoj, virinaj subvestoj - kaj Esperantaj romanoj

Lorjak! Antaŭ la apero de „Neologisme", oni ne konis tiun nomon. Cetere, ĝi estas evidente pseŭda. Kio estas la vera?

– Same evidente, se mi dezirus diri ĝin, mi ne estus elektinta pseŭdonimon. Cetere, tio estas nepre seninteresa, ĉar mia denaska nomo estas tute ne konata, krom de personaj amikoj.

– *Ĉu do vi faris nenian esperanto-agadon?*

– Jes, ja. Sed modestan kaj limigitan. Kunlaboradon al „Franca Esperantisto" antaŭ kaj tuj post la milito, rubrikon en tiu revuo. Dum mia junaĝo, kvarlernantajn kursojn en suburba lernejo de la „Laborista universitato". Amatorajn kaj malbonajn. Kiel pedagogo (!) mi hontinde estis unu el tiom da pseŭdaj „fak"-delegitoj, kiuj trompe embarasas la movadon. Ĉiu faru sian metion!

– *Tamen, kiel verkisto vi jam aperis antaŭ dudeko da jaroj. El „Iluzioj", tiu kolekto da noveloj kiun Hungara Esperanto-Asocio fus eldonis, kelkaŭ aperis en „Monda Kulturo" ĉirkaŭ la jaroj 1964/65, ĉu ne?*

– Jes. Sed mi jam verkis multe pli frue, kiam sub la instigo de l' tiama franca kaj salutinda Prezidisto Pierre Petit mi impetis en la unuan felietonon en Esperanto, kiu titoliĝis „Retoj" por „Franca Esperantisto". Bedaŭrinde, pro ŝanĝo de l' prezidisto, la unua konduto de l' nova konsistis el abrupta ĉesigo pri ĉio, iniciatita de lia antaŭulo. Tial, la fidelaj legantoj de F.E. neniam konis la finon (por kiu ili pagis) de „Retoj". Necesis la aprezo de V. Setälä en 1978 por ke la eldono de „Retoj" venu kompensi tiun literaturan vandalismon. Pro kiu mi kabeiĝis dum 15 jaroj...

– *Kun kia rezulto?*

– ... ke neniu skandaliĝis. Kaj ke mi punis nur min mem. Sufok-oscendante kvazaŭ fiŝo ekster akvo pro manko de Esperantaj okupoj. Ĝis, kiel nekuracebla drogito, mi sendis al la Esperanto-Fondumo la tekston de „Neologisme", kiun mi apenaŭ deziris montri pro la konvinkiĝo ke sen personaj rekomendoj oni neniam akceptus ĝin en tiu medio de blankbarbuloj, tial ke tro fantazia. V. Setälä demonstris al mi la malon tuj kompostigante „Neologisme"on, kaj tio estis la komenco de reviviga feliĉo, kiu kondukis al „Transe", al „Retoj" ĉe li – al „Regulus" ĉe Lina Gabrielli, kaj al „Iluzioj" ĉe vi.

– *Ĉu tio aŭgurigas pri sekvo?*

– Jes: „Mariagnes" nun preparata en Särrebruk, kaj Eŭlalia kiu atendas eldoniston.

– *Ni komentu vian lingvon. Kial vi uzas vortojn kiel „Paris – Roma – London, anstataŭ „Parizo – Romo – Londono"?*

– Ne instigu min paroli pri lingvistiko. Kiel manlaboristo, mi havas neniun kvaliton por tio. Mi uzas la Zamenhofan lingvon tia, kian instruis ĝin al mi Cart, Bastien kaj Bobin. Ĝi estas kodo, kiun mi adoptis, kaj mi obeas la direktivojn de kompetentaj instancoj akademiaj, kiuj regas ĝin. Nu, koncerne la proprajn nomojn, oni ne povas nei ke la lingvo ne estas fiksita. Kaj Paris, Roma, London estas *propraj* nomoj. Ne sufiĉas aldoni „o". Se jes, kiam oni diros BenczikO, TonkinO, BultonO, mi diros ParizO, LondonO, malgraŭ la monotoneco. Demonstras la nunan fantazion de la lingvo la severa verko, kiu estas la adreslibro de S.A.T., kie mi legas *sur la sama paĝo* Pantin kaj Parizo – aŭ Romo kaj Rosenheim. Kial ne Pantino kaj Paris, Roma kaj Rosenhejmo? Des pli ke la solvo de la afero kuŝas sur tasko eble longa, sed simpla. Oni prenu manlibron kiel ekzemple tiun de l' „Reader's digest", kiu entenas la nomon de ĉiuj urboj, eĉ plej etaj vilaĝoj, de la mondo, kaj starigu vortaron de tiuj nomoj. Tiam mi discipline obeos ĝin. Nuntempe, sen lingvaj pretendoj mi adoptis la plej simplan solvon: uzi la nomojn tiaj kiaj ili estas. 90 procentoj estas prononceblaj en Esperanto. Tiamaniere, mi ne bezonas memori du: unu por la interna bezono, kaj duan por la poŝto.

– *Oni riproĉas al vi lingvajn „strangaĵojn".*

– Kiujn oni frontigas al la „kutimoj". Mi abomenas la kutimojn, kiuj kuŝas sur la memoro pli ol sur la mekanismo de Esperanto. Mi diras „prezidisto" ĉar „isto" esprimas funkcion aŭ metion, dum „ant" rilatas al momenta ago nuna. Mi diras mie, vie, nie, ĉar tiam mi pensas adverbe, kaj plenrajte malgraŭ la grumbloj de l' korektistoj. Mi diras „ridero" kontraŭ la kutimo malgraŭ „rideto", kiu devus signifi malgrandan ridon, sed pro tiu kutimo (ve) afablan grimaceton. Mi diras „paŝari" por piediri per multaj paŝoj, eĉ se neniam oni vidis tiun vorton antaŭe. Zamenhof mem deklaris ke la neofteco ne estas kaŭzo de neuzo. Mi ne pretendas per tio starigi skolon. Tio ne povas esti mia rolo. Mi nur uzas la lingvon tia, kian mi lernis ĝin, kun ĉiuj ĝiaj artikadoj. Se ili instigas perplekson, tio stimulas la cerbon, kaj okazas ege malpli ofte ol fronte al la elizioj en nia abundo da poemoj.

– *Sur tute alia tereno: oni diras vin reklamfotisto. El kio konsistas tio?*

– Seria fotado de objektoj, ĝenerale de ĉiuj elementoj de katalogoj. Irante de la kulinaraj instrumentoj al la virinaj subvestoj.

– *Mi aŭdis pri kino...*

– Filmado estas formo de foto, laŭ la utiligo. Oni ne povas demonstri maŝinon per katalogo. Tiam, mi filmas ĝin.

– *Ĉu tiun kapablon vi neniam metis je la servo de la Esperanta afero? Eĥoj venis al miaj oreloj, ke en La Hago... en 1964, oni prezentis...*

– En Den Haag oni „prezentis" nenion. Kaj viajn „eĥoj"n vi tre embarasus, se vi petus la nomon de la prezentisto. Cetere, neniam kaj nenie, krom en Britio, oficialaj instancoj instigis prelegon aŭ artikolon pri tiu naiva entrepreno. Kredu min, paroli pri mortintoj, naturaj aŭ murditaj, ne revivigas ilin. Ni lasu ilin dormi. Cetere, vi devis min intervjui pri literaturo, ĉu ne?

Vilmos *Benczik*

Paĝo de komencantoj

V. Žilinskaitė

Eksmodulo

Tiun homon de malnova fasono mi renkontis ofte ĉirkaŭ mia laborejo. Jam de malproksime frapas la okulojn lia eksmoda jako.

Lia pensmaniero atestas plej evidente pri tio, ke li ne estas moderna homo. Li iras rekte, ne returnante la kapon, ne fumante cigaredon, ne ŝprucante koton sur la ŝuojn de aliaj kaj ne suĉante de tempo al tempo botelon elstarantan el la poŝo. Renkontante konaton li levas la ĉapelon kaj tre klare diras „Bonan tagon". La konato respondas per neklara silabo kaj tiras la ĉapon sur la okulojn, por ke neniu ekvidu lin bonantagi al tiaspeca primitivulo, ekzilinta sin el la nuntempa homaro.

Precipe malmodernaj estas la manieroj de la eksmodulo en konduto kun virinoj. Kiam li proponas al ne juna virino lokon en trolebuso aŭ lasas sin antaŭ si tra pordo, la ino ankoraŭ longe staras en la pordo kaj triste kapbalancas. Kaj la juna patrino, al kiu li helpis levi infanĉareton, etendis al li bulkon, surŝutitan per papavo.

Ĝisatendinte aŭtobuson, la malmodernulo ne iĝas hurlanta bruto kaj ne purigas al si vojon per kornoj kaj ungoj. Foje mi vidis, kiel aŭtobusoj unu post la alia al- kaj forveturis, kaj li restis staranta kvazaŭ apudvoja fosto.

Dum li tiel malmode staradis, alproksimiĝis knabino, ĝuste tia, el kiaj disradias la spirito de nia epoko: duono da jupo, du perukoj, kaj bluaj abismoj ĉirkaŭ la okuloj. La malnovmodulo, nature, ankaŭ al ŝi helpas penetri en aŭtobuson, kaj, por ke ŝi ne falu, li subtenas ŝin per la manoj.

La knabino atente rigardas la eksmodulon, ekkaptas lian manon kaj saltas el la aŭtobuso, retirante ankaŭ lin.

– Mi konsentas – ŝi diras –, sed kien ni iru?

La malnovmoda viro mire rigardas sian kaptitan manon kaj per la alia mano provas ĝentile liberigi sin.

– Ankaŭ mi amas vin – konfesas la knabino, kaj per lia kaptita mano ĉirkaŭbrakas ŝian kokson.

La eksmodulo ĉesas spiri pro la timo. La ĉiam enorda ĉapelo glitas sur la orelojn.

– Nu? – puŝetas lin la knabino perfemure.

– Pardonu min – grumbletas la malnovmodulo, ne povante kapti la falantan ĉapelon. – Mi... mi... ne...

El la bluo de la abismoj ekbrilas verda fulmo

– Do pro kio vi palpadis min? Kial vi ĉtrudiĝis? – ŝi minacis lin per la ferumita mansaketo. – Ĉu vi havas almenaŭ neŭronon en via kapo? Vi, maljuna korvo! En mia tuta vivo mi neniam vidis tian... tian...

– Gramofonon – alsaltis junulo, kun laŭmode ĉifitaj krurumoj kaj amuletoj sur la nuda brusto.

La eksmodulo silente purigas sian polvomakulitan ĉapelon kaj malgaje, eksmode ridetas. Denove alveturas aŭtobuso, kaj li denove restas. Finfine kial li rapidus hejmen: lia edzino forkuris al moderna viro, kiu ne portadas al ŝi printempe ridindajn violojn, sed ŝin abunde provizas per objektoj pli realaj.

El la litova: H. Vaitkevičius

Poul Thorsen

Limerikoj

Difino

La formo de limeriko
piedu laŭ jena metriko:
Unua linio
pri geografio
kaj voste kun verb-erotiko.

Celibate

Monaĥo en Limeriko
promesis monaĥi – sen fiko.
Sed antaŭ inklinoj
de la monaĥinoj
monaĥo nur estas laiko.

Delegita servo

Fraŭlino en urbo Grenviĉo
deforas sub unu kondiĉo:
Se iu vizitas,
ŝi fakdelegitas
nur fake en fakta negliĝo.

Sudismo

Plej sude en Sud-Virginio
knabino famiĝis pro „io".
Teknike virgina,
diable rafina,
ŝi fremdas al nepre nenio.

Nudaj faktoj

Knabino en urbo Fiumo
preferas seksumi en lumo.
La decaj najbaroj
atestas al faroj
en Adm- kaj Evakostumo.

Subnivele

Al domo de pastro en Hago
alflugis marista papago.
Ĝi tute ne pastris,
sed tiel malĉastis,
ke decis por ĝi nur kloako.

Krimo obskura

En nokto plej nigra en Kongo
okazis mortigo pro ronko.
Laŭ loka tamtamo
finiĝis la framo
per fermo de faŭko per spongo.

O. Kníchal

Hobio

Oniaj aspiroj kaj celoj ofte varias laŭ la aĝo. La junuloj kutime fuĝas de la gepatroj por enkorpigi ie aliloke sian idealon, konkeri nekonatan parton de la mondo, dume la pliaĝuloj forgesas pri la junecaj revoj kaj kontente-indiferente gvatas el siaj familiaj dometoj ĉirkaŭitaj de ĝardeno — laŭeble kun sufiĉe alta heĝo.

Estas aliaj, kiujn delonga obsedo ne lasas for ankaŭ en progresinta aĝo. Ekzemple redaktoro Bator, kiu sin okupas... Ne, la okupo ne estas esprimo konvena por tiu agado. Prefere hobio — ni koncedu, iom nekutima, ĉar nur malmulte parenca kun tiaj pasioj kiel kolektado de etikedoj aŭ de poŝtmarkoj. Fakte, ankaŭ Bator kolektadas, sed la eroj de lia kolekto estas vivantaj dissemite tra la urbo. Nome, tiuj ŝatataj objektoj estas de la virina sekso. Jes, la damoj.

Por eviti eventualan miskomprenon ni tuj atentigu, ke absolute ne temas pri iu diboĉulo, jupsekvanto kaj tiel plu, kiel la publika opinio kutimas kvalifiki similajn kazojn. Tia ĉi virinklino havas nenion komunan kun la sinteno de Bator, kiu rilatas al ĉiuj hominoj senescepte serioze. Sen distingo al siaj aĝo, beleco, familia stato aŭ profesio, ili ĉiuj aperas antaŭ liaj spirit-adoraj okuloj kun majuskla komenclitero de sia genro-nomo, laŭ la rango, kiun preskribas amo kaj estimo al Ŝi.

Jes, por Ŝia nomtago aŭ naskiĝtato li foroferis eĉ lastan moneron, kaj se la sorto Ŝin trafis per malsano, li venadis kun ĉokolado kaj konsolaj vortoj. Preskaŭ superhoma klopodo, se ni konsideras la fakton, ke Bator modele zorgis ankaŭ pri sia familio.

Foje li preskaŭ miskalkulis, atendante damon en la propra hejmo, ĉar la familianoj forestis. Ili reaperis neatendite en la momento, kiam la patro — bonŝance — estis preparanta etan regalon. Vidu, ekjubilis la pli juna filino, kiom da dolĉaĵoj por ni!

Liaj kolegoj foje asertas, ke la sopiro de Bator estas ekskluzive erotika. Efektive la vero estas, li bezonis esti ĉiam servanto de siaj kolektitoj. Kaj tion li observadis konsekvence. Neniam li provokis eĉ kvereleton kun ajna favoratino.

Samtempe li ne unufoje devis preventi ĉiaspecajn insidojn, kiujn portas nura hazardo. Bator ekzemple neniam riskis renkontiĝon en malvasta redakcia ejo aŭ ĉe pordistejo, kien la misa vento povus alflugigi gaston nedezirindan, kiel okazis al kolego lia, kies etstilan aventuremon oni eĉ ne povas kompari kun antaŭvidemo de Bator. Duonhoron klopodis tiu mallertulo interpacigi du virinojn, kiuj samtempe lin vizitis, kaj tiam, forskuinte la unuan perturbiĝon, ili ekdraŝis unu la alian per pluvŝirmiloj, kaŭzante tiel gravajn damaĝojn al siaj hararaj pufoj.

Tian amatoraĵon oni neniam povus ligi kun la nomo de Bator.

Multaj miris pri liaj galantaĵoj, tamen la esenca demando, kiu incitis ilian scivolemon, estis tiu pri la fonto por kovri koneksajn elspezojn. Apenaŭ la redakciaj deforoj, opiniis la kolegoj, kaj ili pravis. Sed nur tre malmultaj sciis, ke Bator estas finlerninta tajloro. Tion povis aprezi unuavice la edzino kaj filinoj, kiam la kara paĉjo elsorĉis de ie novkudritan jupon. Jen la ŝparaĵo!

Kaj la kromenspezoj por riparitaj viraj pantalonoj, jakoj, vestoj? Tiu ĉi kontanto, kies eksluziva mastro Bator estis, konsistigis la plej esencan parton de lia privata buĝeto.

Antaŭnelonge mi eksciis de lia kolego, ke Bator sukcesis akiri pli bone pagitan okupon en la ĉefurbo. Jen, mi ekmeditis, bonvena okazo por malŝarĝi la buĝeton. Do, evidente mejloŝtona evento okazis, rompo kun la ĝisnuna vivmaniero. Mi jam imagis, kiel ankaŭ la plej obstinaj pasioj kaj inklinoj sinkas en ĉiutagan grizon, kiel ankaŭ tiu ĉi donkiĥoto fariĝas prudenta ĝardenisto sarkanta en sia propra florbedo.

Samtempe mi ekhezitis — ĉu Bator, oferinta plejeblon de siaj streboj al sia kunulinaro, ĉu tiu Bator povus facilanime kaj senskrupule rezigni pri, ni diru, vivoverko de sia kavalireco?

— Ĉu la familianoj sekvis lin? — mi demandis, esperante ricevi kontentigan klarigon pri tiu subita ŝanĝo.

— Kompreneble!

— Kaj nun, pri kio li okupiĝas?

— Li posteniĝis kiel redaktoro de la tiea porvirina gazeto — respondis mia konato aferece, sed al mi ŝajnis, ke liaj okuloj signifoplene ridetas.

Unu el la ebloj de nia epoko estas entrepreni



Ni entreprenu kune!

Ni entreprenas komplete produkti, liveri kaj surloke munti instalaĵojn de hotelaj ĉambroj kaj komunuzaj ejoj – enlande kaj eksterlande.

Mebloprodukta Fabriko Budapest
Budapest IV. Lórántffy u. 15/b.
Hungario

bubiv

GAJA PAĜO

Ni restu ĉe la temo

Estis alia pacientino, kiu antaŭ la nasko iĝis pli kaj pli nervoza. Ŝi demandis la kuraciston:

– Ĉu vi permesas al mia edzo stari apud mi dum la nasko?

– Jes, mi kutime konsentas, se la patro de la bebo ĉeestas.

– Tamen ne! – ekkriis la ineto –, sufiĉas se mia edzo estos apud mi!

Prave! Estu singarda!

– Mi volas formi novan programnumeron por la cirko. Mi bezonas tiucele kelkajn tutcerte malkuraĝajn leonojn...

Ĉu ŝi ne estis singarda?

– Kiam mi edziniĝis, nu, mia edzo havis kelkajn malindajn ecojn.

– Kaj nun certe malpli...

– Ho ne! Eĉ multe pli...

Ili verŝajne ankaŭ ne...

– Nu, finfine ni sukcesis iel travivi nian nupto-nokton! Sed kion ni faros dum la morgaŭa nokto?

Amikeco estas dia donaco

En kafejeto babilante Linda konfesas al la amikino:

– Mi ĉiam adoregas la naturon, karulino!

– Malgraŭ ke ĝi *tiel* kondutis kontraŭ vi? !

Kasisto serĉata!

– Kial? – oni demandas de la direktoro. – Nur antaŭ du monatoj vi dungis kasiston.

– Akorde! Ĝin ni serĉas.

Nupta vojaĝo

La novgeedza paro tranoktis en hotelo apud la fervojstacio. Matene la edzo foriris aĉeti ĵurnalojn, la edzineto restis en lito, kaj, kiam la ekspresstrajno de la 6,15 horo ege klakadante preterbruis, pro la skuego ŝi falis el la lito.

Ŝi kolere vokis la direktoron kaj plendis, sed li ne kredis la aferon. Pli koleriĝinte ŝi kriis: „Kuŝu mem sur la liton kaj spertu! "

Post minutoj revenis la edzo kaj alkriis: Kion vi faras en la lito kun mia edzino?

– Ĉu vi kredas, aŭ ne, mi atendas la ekspresstrajnon de la 6,45 horo.



Kara majstro, sed tiu nudaĵo post 2000 jaroj ŝokegos la legantojn de HV.

Relativeco

– Ĉu vi memoras la tezon? Ĝi pravas, en la mondo vere ĉio estas relativa!

– Kiel vi konkludis tion?

– Rigardu, la 100 kronoj pri kiuj mia edzino ne scias, estas pli valoraj por mi ol la milo, pri kiu ŝi scias!

... pri edzino?

– Ĉu mia nova edzino? Ho mia karulo, ŝi estas grandioza! Ne nur tial, ĉar ŝi estas bela, sed ĉar ŝi neniam staradas pli ol duonhoron antaŭ montrofenestro.

... kaj pri edzeto

kiu sidante en fotelo admire rigardas televidon, dum la edzineto gladas en korbo amasiĝantajn tolaĵojn. Finfine la edzeto ekgrumblas:

– Estas nervozige vidi tiun senfinan laboron! Ĉu vi ne povus gladi plu en la kuirejo, karulino?

Kaj fine, propono

al junaj geedzoj: registru viajn kverelojn per magnetofono! Kiel plezure estos dum maljunaĝo ree aŭskulti ilin vintre en la varma ĉambro...

Nur atente demandu!

En granda magazeno la ĉarma vendistino servoprete demandas junulon:

– Kara sinjoro, kio estas via deziro?

Post iom da meditado la junulo ekkuraĝas:

– Mi deziras vin akompani hejmen kaj ami vin kun granda pasio! Sed kion mi *bezonas*, estas paro da ŝtrumpoj...

Ankoraŭ demando

Marieta demandas de la panjo: Ĉu mi havas ankoraŭ laktodentojn?

– Jes, mia kara.

– Do certe paĉjo havas jam bierodentojn, ĉu ne, panjo?

Ne demando: problemo!

La ĉefkuracisto faras la kutiman rondviziton en la naskejo. Li alparolas tre junan knabinon:

– Nu, kian infanon vi deziras?

– Filon, doktoro.

– Kaj kiel vi nomos lin?

– Ankoraŭ mi ne scias: se lia hararo estos malhela, tiam Maŭrico, se blonda, tiam Ernesto, kaj se bruna... nu, tiam Joĉjo...

E.F.

recenzoj * recenzoj

Proza balado pri vulpoj

Hiroyuki Takahasi: Vulpoj de Ĉironnup. Ilustraĵoj de la aŭtoro. El la japana tradukis: Masahisa Niwa. Eldonis la Tradukinto (Gokuraku 2-171, Meitoku, Nagoya, 465 Japanio). Bindita. 49 p. 24 cm.

„Ĉironnup" signifas en la lingvo de *ainoj* (indiĝenaj loĝantoj de la japanaj insuloj) – v u l p o . La aŭtoro de la rakonto tiel nomis la insulon, kie en la jaro 1944 – dum la furioza milito – li vidis multajn ferajn kaptilojn, kiujn metis kontraŭleĝaj ĉasistoj por kapti per ili vulpojn. Kaj ĉe iu el la kaptiloj li rimarkis etan skeleton de vulpido, ĉirkaŭ ĝi sennombrajn ostetojn ŝajne de ratoj kaj birdoj. Tiuj skeleto kaj ostetoj generis en li la kortuŝe belan rakonton pri vulpino, kiu ĝis la finiĝo de la ebloj nutris sian kaptitan idon, alportante ratojn kaj birdojn.

La efikon de la historio fortigas la belegaj tutpaĝaj desegnaĵoj sur ĉiu dua paĝo, kaj la trafa, perfekta traduko.

Vulpo de Ĉironnup estas belega bildlibro, kiun volonte tralegos kaj trarigardos ĉiuj infanoj kaj plenkreskuloj, kiuj amas la naturon kaj bestojn, kaj havas malfermitan koron por senhonte ĝui naive emocian historion pri amo inter gepatroj kaj infanoj.

V. *Benczik*

Informe pri Ĉeĥoslovakio

Meze de Eŭropo... Skize pri la historio de Ĉeĥoslovakio. Esperantigis: E. Seemanová, O. Kníchal kaj A. Stanura. Eldonis: Panoramo, Prago, 1980. 99 p. 21 cm. Ilustrita. Prezo: 15,- kronoj.

Pro la specifaj cirkonstancoj de Mezorienta Eŭropo la ŝtato Ĉeĥoslovakio estis proklamita antaŭ apenaŭ 63 jaroj, en oktobro de 1918, sed la nacioj ĉeĥa kaj slovaka vivas sur sia nuna teritorio jam de pli ol jarmilo. Tiu ĉi lerte redaktita libreto de la eldonejo „Panoramo" donas koncizajn informojn pri la vivo de la du frataj popoloj al la ĉiulanda esperantistaro.

Malfacilas doni ĉi tie iaspecan resumon de la informriĉa kaj plaĉaspekta eldonaĵo. Mi kaptu nur unu aspekton tre gravan el vidpunkto esperantista: la aŭtoroj (anonimaj) ĉiam klare kaj sincere pritraktas la rilatojn inter ĉeĥoj kaj slovakoj, ne forneante tiujn malavantaĝojn, kiujn slovakoj devis toleri kulpe de la ĉeĥa burĝa naciismo.

Pro la fakto, ke la sorto de la ĉeĥa, slovaka kaj hungara popoloj dum longa tempo estis kunligita en la Habsburga Monarĥio, aperas en la libro pluraj indikoj, kiuj koncernas ankaŭ Hungarion. Estu permesite ĝustigi ĉi tie unu tian indikon: en 1890 fondiĝis en Budapeŝto *Hungarlanda* Socialdemokrata Partio, kaj ne „Socialdemokratia hungara partio". La epiteto „hungarlanda" estis intence elektita: ĝi esprimis, ke en la partio aktivis ne nur hungaraj laboristoj, sed ankaŭ anoj de aliaj nacioj, vivintaj tiam sur la teritorio de Hungarlando.

Agrable legebla kaj utila libreto.

V. *Benczik*

Memoriganta admono

Sachsenhausen. Albumeto pri iama koncentrejo. Eld. Muzeo pri kontraŭfaŝisma liberiga batalo Sachsenhausen 1981. 21 cm 36 p.

Proksike al Berlino la nazioj establis en 1936 terure famiĝintan koncentrejon, kiu laŭgrade fariĝis centro por la aliaj. La SS-komandantoj de la koncentrejoj, kiuj troviĝis krom en Germanio en ĉiuj okupitaj landoj de Eŭropo, tiuloke estis trejnitaj por la kruelega agado. De tie direktis *centra oficejo* la ekstermadon de multmilionoj de la plej diversaj arestitoj, militkaptitoj kaj deportitaj familiaj „transportoj".

Ilian teruran sorton realece imagi neniel kapablas la novaj generacioj, nek tiuj, kiuj siatempe feliĉe evitis la vojon al tiaj surteraj inferoj. Nenia priskribo, nenia originala foto sukcesas *plene* rekrei la nekredeblan, la fantazion multe superantajn ĉiutagojn de la rafinite elformita sklavlaborejo kaj ekstermejo. Rajte kaj prave, ĝi transformiĝis hodiaŭ „Nacia tereno por admono kaj memoro". Muzeo (de multaj nacioj) kaj teruraj restaĵoj de krimcelaj konstruaĵoj atestas kaj avertas, sed ankaŭ memorigas – ne silentante. Memorigas ankaŭ pri grandioze heroa rezisto de la kontraŭfaŝismaj batalantoj, kiuj malantaŭ la elektra drato luktis por la vivo de kamaradoj, kaj la konspiradon finis tre ofte la kugloj de la murdistoj. Tamen la lukto neniam ĉesis – ĝis la horo kiam la liberiganta soveta tankkolono detruis la barilojn. Pli ol dudek nacioj lasis tie ĉi siajn martirojn... La sobraj klarigoj, la multaj originalaj fotoj inter la tekstoj per eminenta Esperanta lingvaĵo, precize kaj per senpatosaj frazoj esprimas tre multe. Laŭdinda eldonaĵo!

Ervin *Fenyvesi*

Muzeologia terminaro

Dictionarium Museologicum Germana–Esperanta muzeologia leksikono. Provizora eldono de Int. Konsilio de Muzeoj, Komitato pri Dokumentado. Budapeŝto, 1982. 21 cm. 44 p.

La kreskanta internacia kunlaboro de muzeaj kunlaborantoj instigis la supran gravan grupon de aŭtoritataj fakuloj kompili multlingvan terminaron por tiu ĉi scienca branĉo. La reciproka kompreno bezonas certan normigon de la terminologio, almenaŭ (kaj plej unue) en la sfero de la bazaj-gravaj terminoj de la praktika specifa laboro en la muzeoj. Laŭlande diversaj kutimoj, aliformaj nomoj de objektoj kaj agadoj, funkcioj en la muzeoj malfaciligas identigon inter muzeoj, kaj povas ege ŝarĝi la korespondadon (por ne mencii la ofte kompatindajn interpretistojn). La ideo estas do nepre salutinda, eĉ pli la rapida kunlaboro, kiu dum kelkaj jaroj produktis jam

recenzoj

dekon da nacilingvaj ekvivalentoj al la baze servanta germanlingva terminaro.

Konatajn fakulojn – Tibor *Sekelj*, kaj Bernard *Golden* – laŭdas la penetro en tiun branĉon: ili iniciatis kaj preparis por la germanlingva terminaro la taŭgan kaj plenan Esperantan vortliston. La jena provizora eldonaĵo celas ricevi rimarkojn kaj kritikojn unuavice de fakuloj en muzeologio. Fluga trarigardo jam ŝajnigas, ke rimarkoj apenaŭ abundos: la transplantado de la germanaj terminoj ĝenerale trafe sukcesis, ankaŭ sinonimoj konvene troviĝas post la unua termino. La redaktoroj sukcese evitis enlistigi pli da neologismoj ol nepre necesigas fakaj vidpunktoj en kelkaj okazoj (temas preskaŭ nur pri internaciaj vortoj): protohistorio, tezaŭro, suveniro k.s. En la temploj de la muzoj la IL okupis novan pozicion!

Ervin *Fenyvesi*

László Hárs

Poemo pri la poeto

Senhelpa estas la poeto:
mallerta por misfaroj,
la luno: lia havafeto,
kaj longas liaj haroj.

Li stumblas – ne nur unu fojon –
ĉar supren li rigardas,
sed konas vian sorton, vojon,
fidele vin li gardas.

Lin la feliĉaj ne komprenas,
la tristaj nur sporade;
en dektra man' li lunon tenas,
admiras ĝin revade.

En man' maldekstra via koro
ripozas en manplato...
(Ĉu ne senteblas la konsolo
per tiu ĉi kompato?)

Lin amas la nubar' kafole,
karesas vent' tenere...
Sekrete li forflugos foje
melodimaniere;

poemoj rimaj en etero
aperos sur la nubo,
ne lasos supron li sur tero,
ĉar lia tombo iĝis – lumo.

(*Tradukis: Julio* Varga)



LEHEL

Gusto, koloro konserviĝas en la fridujo

LEHEL

Portebla magnetofono

kun kasedoj

BRG

MAGNETOFON

NOVAĴO ŬJDONSAĜO

Du proverboj



sin kaŝas en la linioj **H.1.** kaj **V.13.** Ensendu nur ties solvojn.
Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. Inter solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: **13.** Loĝanto de Azia lando **14.** Diboĉa kunveno (R) **15.** Kuiri en forno (R) **16.** Kemia elemento (R) **17.** Maldolĉa (R) **18.** ...ologio: scienco pri funkcioj de vivuloj **19.** Dombesto fajnvianda (R) **20.** Vira ceremonia vesto (R) **21.** Konusforma fiŝkaptilo (R) **22.** Deflankiĝi de la ĝusta vojo (R) **23.** Ŝuo de antikvaj aktoroj, kun alta plando (R) **25.** Gerbdifekta **28.** Japania havenurbo **30.** Patro de patro (R) **31.** Valormetalo (R) **32.** Moninstituto (R) **34.** Bagatela (R) **35.** Numeralo **36.** Loĝejo por birdoj (R) **38.** Armilaro de artileriistoj **41.** Teruranta bildo, fantazia sonĝo (R) **43.** Malmola (R) **44.** Adverba tabelvorto **46.** Celanta liberigon de nacia teritorio **49.** Arkforma ŝtona plafono (R) **50.** Multe da fojoj (R) **52.** Religia ceremoniaro (R) **53.** Tersurfaco inter difinitaj limoj **55.** Tabelvorto **56.** Konjunkcio **57.** Densa dolĉa solvaĵo (R) **59.** Arda entuziasmo, preskaŭ senkonscia (R) **61.** Fera laborilo por skrapi kampon **63.** Malsaneca ruĝa ŝvelaĵeto sur haŭto **65.** Persona pronomo **66.** Kanto **67.** Eŭropa ĉefurbo **69.** Dramparto **71.** Marĉa longkrura birdo (R) **72.** Fortege, nenormale inklinanta **73.** Poseda pronomo refleksiva **74.** Vertikala grando **75.** Abrupta malsana malpliiĝo de la homa forto.

Vertikale: **2.** Veturilo **3.** Grekortodoksa eklezia distrikto (R) **4.** Kirasita militveturilo (R) **5.** Unuiĝo (R) **6.** NO **7.** Listo de nomoj **8.** Islama lando (R) **9.** Kulturebla kampo (R) **10.** Persona pronomo **11.** Longkrura Afrika birdo **12.** Izolita loko en dezerto (R) **17.** Speco de papago (R) **18.** Fatala **20.** Francia monunuo (R) **21.** Postvesperan **22.** Malgranda **23.** La unua murdisto laŭ Biblio **24.** Malofta (R) **26.** Sekigi malsekãn grundon (R) **27.** Hermetike fermi (R) **29.** Koncerna korpkulturon **33.** Kandidato de oficira rango **35.** Nuanco de voĉo **37.** Ano de iama nomada tribo (R) **39.** En tiu ĉi tempo **40.** Imagos ion deziratan **42.** Kemia elemento „Be" (R) **45.** Poseda pronomo **47.** Perbuŝa sciigo **48.** Ludejo en cirko **51.** Metalo (R) **54.** Ero de ekonomio! **57.** Homa brusto **58.** Toleri ion senkolere, indulgi (R) **60.** Pena tirado post si (R) **62.** Senkolora alkala bazo (KOH) (R) **64.** Demandvorto **66.** Ekzemple: muziko **67.** Unu el Sundaj insuloj **68.** Koncerna oston de brusto **70.** Kiel V.64 **71.** Diferenca, malsama (R) **72.** Translokigi ion (R) **74.** Prepozicio **75.** Kultura Asocio!

Krzysztof *Groman*

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1982/3: paleontolog, farmakologi, nacionalism, elektrometr, ideal, regal.

Libropremion gajnis per lotumado: Miroslav *Hromas,* Hradec Kralové, CS; *Yamaguti* Mitio, Tyausuyama, Japanio; *Junulara E-grupo „Mező Imre",* Eger, H. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj. Ni gratulas al la multaj solvintoj, kaj kuraĝigas la ankaŭ multajn, kiuj iel mistrafis.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Kain kaj Abel

de Sándor Szathmári

Sándor Szathmári estas klasikulo de nia literaturo. Liaj libroj estas ŝatataj kaj legataj ne nur de Esperante legantoj, ĉar ili estas tradukitaj en aliajn lingvojn.

1. Kie laboras Palva, la heroo de la rakonto „Honorigo"?
2. Reĝo de kiu insulo estis Pygmalion?
3. Kiom da horoj por amo, kaj kiom da horoj por lernado oferis tage la heroo de la rakonto „Du maksimoj"?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1982/3.:

1. ...„sezon' de l' tempo kaj moment' de l' horo,
la bela land' kaj lok', kie la koro
ligiĝas per la rava okul-paro."
(Francesco Petrarca)

2. Adam Mickiewicz (verkis: Odo al la juneco).

3. Stilian Ĉilingirov: „Ni" komenciĝas: „Jen ni: tagoj nevivitaj."

Libropremion gajnis: *Halász* Róza, Salgótarján, H; *Ŝamŝiev* Jakub, Samarkando, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

LETERKESTO

Mohov, Aleksej, SU, *Kirov:* „Mi ege ŝatas la gajan, amuzan, porinfanan poezion E-an" – vi skribis, kaj ni povas nur la saman opinion esprimi. Certe, en tiuj ĝenroj Eo montras aparte sian belecon, la ludajn eblojn de nia (nehazarde) poezia lingvo. Vi trovos en la Ea literaturo abunde da tiaj *ludaj poemoj,* kiuj majstre eluzas la ludeblajn son-efikojn de Eo. Ni direktas vin (interalie) al tiaj poemoj de Julio *Baghy,* porinfanaj poemoj de Ludmila *Jevsejeva* – kaj ni certas, ke foliumante inter la poemoj vi renkontiĝos ankaŭ kun malpli ludemaj, sed plian impreson donaj poemoj. Plezuran serĉadon en la poemaroj!

Stalbun, Nathalie, SU, *Petropavlovsk-Kamĉatski:* Legante viajn poemtradukojn kaj leteron el la fora Kamĉatko, ni ĝuis precipe vian eminentan lingvaĵon. Kiel juna instruistino vi bonege posedas Eon kaj vivigas ĝiajn esprimilojn, kiuj cetere ne estas tiel aerfacilaj kiel oni ofte imagas ek-ekverki provante. Aliflanke ni iom hezite rezignas pri la tradukita poemo, publikigi tradukaĵojn ĝenerale ne apartenas al nia kutimo. Nur flanke ni konsilas, ke apud la tradukaĵoj prefere sendu ankaŭ la originalon – tio estas ĝenerala postulo de redakcioj tutmonde, por kompari la fidelecon de la „transplantado". Via kunlaboro por eventuala antologio ŝajnas probable bonvena ĉe vialanda eldonagado. Varman saluton!

Curtis, David, GB, *Weston-super-Mare:* Laŭ nia scio, viaj sugestoj – kune kun alies deziroj – ne estis vanaj: dum kaj post la UK en Budapeŝto oni organizos taŭgajn ekskursojn kaj kunvenojn ankaŭ por naturistoj. Certe vi pravas dirante, ke interkonatiĝi, „kongrese vivi" – almenaŭ parte – eblas ankaŭ sur agrablaj plaĝoj, precipe en arda somero. Tamen ni ŝvitos ankaŭ dum la kongresa balo dancante.

Karaamudini, Mohamed, Irano, *Sirjan:* Via bone formulita letero neniel montris vin nova e-isto, sed kiel kapablan! Pri via kontento dum legado de H.V. la laŭdesprimojn ni kvitancas plezure. Bonvolu informi nin foje pri la tiea e-ista societo, inter la instruistaro aŭ alie. – La anoncojn ni laŭkutime senpage publikigas, ĉar tion ni konsideras necesa servo por la legantoj. Multajn plezurojn pere de IL!

Mity, E.R., SU, *Taŝkento:* Vi certe rimarkis en nia revuo, ke ne abundas en ĝi poemoj, precipe ne tradukitaj. Ne necesas klarigi, ke el inter la multaj poeziaĵoj ni publikigas – respekte al la legantaro! – nur la plej rimarkindajn. Povas esti, ke nia gusto eraras, tamen *selekto* devas okazi. – Via sprita „homa genezo" rikoltis en nia rondo aplaŭdon, ankaŭ virinoj ridis senĝene! (Cetere, unu el viaj poemoj aperas en tiu ĉi numero.)

Skakunov, I. Ivan, SU, *Kievo:* Konsentite, ke ĝenoj povas malplezurigi legadon de revuo, tamen estas ne facile kompreneble, ke ilin kaŭzis ĉe vi la ŝercaj desegnaĵoj pri ĉarmaj virinetoj en H.V. Ni ne konsentas, ke iu ĉarmulino en nia unua n-ro ĉijara varbas *tro entuziasme* por H.V., sed kial preni la ŝercon serioze? Certe, la „televida konkurado" en sekva numero estas jam malpli fantazia: realbaza ironio koncerne filmprogramojn. Tutcerte, tiaj gajaj karikaturoj ne instigas sekvi la desegnitajn... kaj ni opinias niajn legantojn *plenaĝuloj,* kiuj ne timas de kelkaj inaj formoj, se belaj. Ties desegnon, ankaŭ kiam kelklinie indikas aman brakumon, la arthistorio ne trovas „senmorala", almenaŭ depost la renesanco. La kristana moralo, kiu altrudis *kaŝi* ĉian homan naturaĵon, verŝajne ne foriĝis ankoraŭ de ĉiuj mensoj (ni respektas ilian guston), sed ili ne forgesu: aliuloj havas alian guston, ankaŭ respektindan, ia estimata leganto povas esti trankvila: gaja ŝerca desegno ankoraŭ neniun faris vulgara, eĉ se ĝia nivelo (bedaŭrinde) ne atingas la belegajn nudojn de Rubens aŭ Hokusai.

E.F.

Korespondi deziras

Instruistino Lenke *Szász* amas literaturon, naturon, belartojn, interesiĝas pri aliaj popoloj. Kun e-istoj tm, el romantika regiono Harghita. R-4174 *Praid,* nro 130. – Studento *Matvejev* Aleksandro (24) pri ĵazo, E-movado, interŝ. diskojn. *Salavat-9,* ul. K. Marksa, d.2, kv. 32. SU–453 200. – F-ino *Semeniĥina* Olga (20) kun ĉ.1. pĉt. Regiono Doneck, urbo *Havjansko,* str. Oktobra revol. 4o/45, SU–343 206. – F-ino Elzbieta *Szarek* ktm, *Gardwin,* Jagodne 65, PL-08-400. – F-ino Danuté *Daĉiulyté* (15) pri lingvoj, sporto, muziko, kol. pm, bk, fotojn de muzikensembloj, kun samaĝaj. *Kupiŝkis,* Lauko 11. Litovio, SU-234-880. – Karin *Pärt* (13) lernantino kol. bk, kalendaretoj, ktm. *Valtu kolh.* Estonio, SU-203.500. – F-ino Sonja *Tiĥova* (30) E-instruistino pri lernejaj laboroj, ŝatas muzikon, kantojn, turismon, kol. bk, kun hungaroj. *Gabrovo,* str. Ĉardafon 2, BG–5300. – Stanislav *Kreminskij,* ktm, *Kamenec-Podolskij,* str. Ŝevĉenko 20, SU–281.900.

Por membroj serĉas gehungarojn korespondi E-a Societo Balkana Stelo, *Trojan,* p.k. 90, BG–5600. – E-o Klubo Suda Stelo kun ges-anoj kaj E-kluboj, precipe el ĝemelurboj de Odeso (Szeged, Marseille, Liverpool, Baltimore, Genova, Varna, interŝ. eblas albumojn, ekspoziciojn, ktp. resp. certa. *Odessa,* Primorskij bulv. 9, Dvorec morj. komn, 22. SU–270.026. – *Ŝitov* Jaroslavo (27) ktm pri filozofio, klas. muziko, k.a., kol. bk, diapoz. arkitekturajn, resp. certa. *Lvov,* ul. Lermontova 3, kv. 9. SU–290.005. – Studento Krasimir *Rusev* (22) ktm pri belliteraturo, mod. muziko, koresp. ŝako, eblas recipr. gastigo, resp. certa. *Pomorie,* Saedinenie 4, BG–8200. – S-ro Gintaras *Žiaunys* pri faŭno, pentroarto, interŝ. pm, *Mažeikiai,* Žamaitijos 9-25, Litovio. SU–235.500. – Studenta E-klubo Stelo dez. kontakti kun E-kluboj kaj ges-anoj. Adr. Marina Ĵelnina, *Perm,* str. Bolŝevistskaja 98-23, SU-614.001.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Judit Somhegyi.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, d-ro Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: Tibor Vaskó. + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 90,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H–1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto.+ Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: Tibor Vaskó. hearota-82 606

Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704

Hi-Fi? ORION
SUPER Hi-Fi BOX



* Fidindeco
* Moderneco
* Longa vivdaŭro

HS 9 : * HS 280 * HS 500

HS 501 * HS 700

SONRADIATOROJ



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

Konsumturist

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.

18 jan 1983